

EL POPOLA ĈINIO

V-19034

中國報

12
1978




FINKONSTRUIĜO DE OLETUBA LINIO ŜANDONG-NANKINA



Mateno ĉe pumpstacio


La oletuba linio de Ŝandong-provinco ĝis Nankino, konsistanta el la trunklinio de Linji en Ŝandong-provinco ĝis Nankino en Giangsu-provinco kaj la branĉo de Dongjing ĝis Linji en Ŝandong-provinco kaj la branĉo de Canghian-gubernio en Hebej-provinco al Linji. Tiu linio kun totala longeco de 1,029 kilometroj interligis la tri petrolkampojn de Daking, Norda Ĉinio kaj Ŝengli. La finkonstruiĝo de tiu linio havas gravan signifon por plibonigi la dislokiĝon de brulaĵoj de nia lando, forigi la neceson de transportado de karbo de norda Ĉinio al la suda, mildigi la intensecon de fervoja transportado en orienta Ĉinio, rapidege disvolvi la agrikulturan kaj industriajn produktadon en la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero, disvolvi la petrolan industrion de nia lando kaj rapidigi la modernigon de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj sciencoj kaj teknikoj de nia lando.

Premo kaj varmo estas aldonata ĉe Linji.





La oleaj drakoj transpasas Hujhe-riveron.




Enpumpa valvego



La otehaveno de Nankino



Oleo enŝipigata



Kreado de profunda fosajo per dinamito por enmeti oletubon

Ekzamenado pri la
veldajoj de oletubo

La linio en konstruado






Granda Olekampo de Ĵenkiu

Geologiaj laborantoj faris gravan kontribuon al la prospektorado kaj ekspluatado de la Olekampo de Ĵenkiu.

Gia Hianmej (la 2-a de maldekstre), vicestrino de la Unua Olekolekta Taĉmento fariĝis modelo en lernado de Ferulo Vang en la tutlanda petrola industrio pro sia bona prizorgado de altprodukta oleputo.



Granda pumpstacio de ole-kolektado kaj transportado



Teknikistoj ordigas donitaĵojn pri prospektorado.

Sur la Ebenajo de la meza Hebej-provinco konstruiĝis alia altprodukta olekampo, nome la Olekampo de Ĵenkiu.

En 1976, oni sukcese boris en tiu olekampo oleputojn kun taga produktokvanto de mil aŭ kelkmil tunoj kaj konstruis por ĝi du gigantajn oletubajn liniojn kaj pumpstaciojn bezonatajn. En unu sola jaro oni jam sukcese prospektoris kaj komencis ekspluati la olekampon kaj produktis valorajn egalan al la investaĵoj.

Ĉe Ĵenkiu oni unuafoje trovis oleon en paleozoika Ĝendan-sistema stratumo kaj boris altproduktajn oleputojn. Tiu grava eltrovo de la petrolo geologio de nia lando malfermis novan terenon por la ŝtonolea prospektorado de nia lando.



Por longtempa stabila alta produktado, la olekolektantoj rigore observas la regularon.

Intensa trafikado

de TIANŜEN kaj HIAŬJUN


“Jangzi-rivero ja ne estas rivero sed daŭrigo de la maro.” “Ĝi estas rivero kun mita beleco!” Tiajn admirojn esprimis fremdlandaj amikoj post turisma vojaĝo tra tiu rivero. Kaj vere superba estas tiu plej granda rivero de nia lando kun fonto sur la Kinghaj-Tibeta Altebenajo. Ĝi longas 5,800 kilometrojn kaj enverŝas ĉiujare mil miliardojn da kubmetroj da akvo en la maron, t.e. kvaroblon de tiu de Volgo, la plej granda rivero de Eŭropo, kaj nur iom malpli ol tiu de Amazono en Latinameriko. Tiu longa rivero kun granda trafikebleco akceptas en sian vastan sinon la akvon de multaj branĉoj kaj lagoj kaj provizas nian landon per 3,000-kilometra naviga linio por motoraj ŝipoj tra 9 provincoj kaj unu municipo. Kvinono de la ĉina tero estas sub irigaciado de ĝia akvo kaj du kvinonoj de la ĉina loĝantaro sin vivtenas dank’ al ĝia nutrado.

Multaj famaj poetoj kaj beletristoj de antikveco faris vivecajn priskribojn pri Jangzi-rivero. Iuj laŭdis ĝiajn imponecon kaj superbajn pejzaĝojn, aliaj notis ĝiajn senbridecon kaj kruelajn plagojn. Kiel nun ĝi aspektas? Por koni ĝin, ni faris antaŭ nelonge vojaĝon per ŝipo en la rivero. Ni ekveturis supren de Vuhan ĉe ĝia meza parto, atingis Ĉongking en ĝia supra baseno kaj poste retroveturis malsupren ĝis Ŝanhajo ĉe ĝia enfluejo. Dum la veturado ni ricevis neforgeblajn impresojn pri la imponaj belaĵoj de la rivero kaj pri multaj ŝanĝiĝoj okazintaj al ĝi en la lasta tempo.

Kiom da jaroj la torenta riverego trapasis en la malnova Ĉinio, tamen ĝi restadis senŝanĝa en aspektoj. Tiam ĝi ricevis nenian reformon,

havis multajn rapidfluejojn kaj rifojn kaj ĝia furioza fluo englutis sennombrajn ŝipojn, vilaĝojn kaj kampojn ĉe ĝiaj bordoj. En ĝiaj meza kaj malsupra partoj navigadis kanonŝipoj de imperiismaj landoj, kiuj senbride kaj avide prirabis ĉinajn riĉfontojn en la internaj regionoj.

Jangzi-rivero komencis ŝanĝiĝi en la lastaj 30 jaroj. En la jaro 1949, miliono da popolaj armeanoj sub la komando de Prezidanto Maŭ transveturis ĝin kaj finis la kriman regadon de la reakciularo de Ĉiang Kajŝek kaj Kuomintango. En la komenca periodo post la fonda de la nova Ĉinio, la navigaj laborantoj jam mezuris ĉiujn



Haveno Ŝanhajo

ĝiajn danĝerajn rapidfluejojn en iom pli ol unu jaro kaj faris desegnojn pri ĝia fluejo kaj komencis ordigi ĝian naviglinion en 1953. La ŝtato starigis la Navigan Administracion de Jangzi-rivero en Vuhan, reformis pli ol 280 privatajn navigajn entreprenojn, reprenis la navigan kaj ankradan rajtojn forprenitajn de fremduloj kaj faras unuecan gvidon al la transportado kaj havenaj laboroj de tiu riverego.

Kun la disvolviĝo de la nacia ekonomio, 94 ŝipkonstruejoj estis starigitaj laŭlonge de la rivero, kiuj produktis modernajn pasaĝerajn ŝipojn, dukorpajn ŝipojn, cisternajn ŝipojn kaj remorkojn kaj 10-oble plimultigis per tio la totalan tonel-kvanton de ŝipoj kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Tute aliĝis la stato de trafikado de Jangzi-rivero en la malnova Ĉinio kiam “neniu ŝipo farita de Ĉinio mem en ĝi veturas, kaj nur fremdlandaj ŝipoj en ĝi hurlas”.

Dum la vojaĝo, ni veturis per pluraj specoj de pasaĝeraj ŝipoj kaj pririgardis varajn kaj flugilhavajn ŝipojn, kaj ni ofte vidis ŝipojn plenŝarĝitajn de petrolo, karbo, ŝtalaj materialoj, konstruaj materialoj kaj varoj por subteni agrikul-

turan produktadon malankrantajn aŭ albordiĝantajn en havenoj, ĉu en la supra baseno kie estas multaj mirinde belaj montoj kaj vidindaĵoj, aŭ en la malsupra baseno kie estas multaj urboj kun fabrikoj kaj grentenejoj. Tio manifestas la prosperiĝon de la nacia ekonomio kaj la rapidan disvolviĝon de la industrio kaj agrikulturo post la faligo de la “kvarpersona bando” en 1976.

En la lasta tagdeko de aŭgusto, la ŝipo Changjiang N-ro 2048 kun 12 barĝoj puŝataj de ĝi formis grupon kun longeco de 8 fervojaj vagonoj kaj ekveturis de Ŝanhajo portante pli ol 12,000 tunojn da feraj ercoj al Vuhan.

Ni ascendis la stirejon de la ŝipo kaj vidis propraokule, ke tia puŝata barĝaro veturas facilmove, rapide kaj ekvilibre kun bona rezistivo kontraŭ vento. Iu akompananto diris al ni, ke nun ni havas 5 tiajn puŝŝipojn, kiuj povas puŝi per ĉiu ĉevalpovo meznombre 5 tunojn. Ĝis la fino de la kuranta jaro, la nombro de tiaj barĝaroj baldaŭ kreskos ĝis 11. Oni diris, ke la sesdekaj jaroj, la kvanto de la transportataj varoj kreskis malrapide. Sed en la lastaj du jaroj ĝi estis 150 kaj 200 procentoj respektive de tiu de 1976. La duono de la transportata kvanto de




aŭgusto de la Naviga Administracio de Jangzivero jam superis tiun de unu tuta jaro en la komenca periodo post la Liberiĝo.

Antaŭ nia ekveturo de Vuhan al Ĉongking, ni intervjuis Kamaradon Vang Fu, kiu estas administranto pri pasaĝera transportado. Li diris al ni, ke nun la naviga administracio havas 46 periodajn ŝipliniojn de Ĉongking al Ŝanhajo kaj ĉiutage 7-8 pasaĝeraj ŝipoj ekveturas de Vuhan. En la lastaj 5 jaroj, pli ol 10 pasaĝeraj ŝipoj, el kiuj ĉiu havas lokojn por ĉ. mil pasaĝeroj, ekfunkciis. Tiuj ŝipoj estas bone ekipitaj kaj elegantaj. La ĵus konstruitaj Dongfanghong N-roj 17—22 estas ekipitaj per aŭtomataj ventoliloj kaj teleŝtirilo. Iu proponis, ke ni veturu per unu el la modernaj ŝipoj.

Tamen ni elektis por ni la ŝipon Jiangxia kun 3,000 ĉevalpovoĵoj kaj lokoj por pli ol 700 pasaĝeroj, ĉar oni diris, ke iuj preferas veturi per tia plene kontentiga ŝipo ol per aviadilo.

Ascendinte la ŝipon Jiangxia, ni trovis ke la aserto estas tute vera. Ni pririgardis ĝiajn bibliotekon kaj vendejon. Kiam ni revenis al nia kajuto, servistoj jam alportis al ĝi litaĵojn. En la ok tagoj de nia veturado ir-reira, neniu el la prenitaj manĝoj similis unu al alia kaj plaĉis al ni precipe la stufita porkripaĵo kun lotusradiko, vianda pasteĉo kaj vaporumita fiŝo kun supo, kaj multaj pasaĝeroj esprimis kontentecon pri la malvarmaj manĝetoj kaj biero en nokto. Ni ankaŭ informiĝis poste, ke iuj el la servantoj de la ŝipo nun lernas la anglan lingvon por akcepti ĉiam pli multajn fremdlandajn turistojn.

En la tago, kiam nia ŝipo trapasis la montgorgon Vuhia, ni ĝuis sur la ferdeko la pitoreskajojn de la kanjono kun torento turniĝanta en




Pasaĝeroj ludas ŝakon.

ĝia profundaĵo. Kelkaj studentoj kaj instruistoj de la Ŝanhaja Piktura Studio invititaj de la naviga administracio klopodis tie bildigi la naturajn belajojn. Per megafono oni donis informojn pri la historiaj restaĵoj kaj vizitindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo kaj ankaŭ disaŭdigis la Pianan Konĉerton de B Bemola de Betoveno. La potenco kaj bela melodio ŝvebadis super la akvo pliigante la plezuron de la vojaĝantoj.

Nia gvidisto diris: “En la pasinteco, estis malpermesite veturi en nokto kaj en tempo kiam la fluo estis tro malprofunda aŭ tro ŝveliĝinta kaj kiam la vetero estis malbona. Nun la navigejo estas jam glatigita, elektraj navigaj semaforoj estas instalitaj kaj la malnovaj regularoj jam ne plu validas!”

Ni faris komparojn kalkule: Por la ir-reira vojaĝo de Vuhan al Ĉongking kun veturado tra 1,370 kilometroj ni uzis nur 8 tagojn, sed en la

La ŝipo Changjiang N-ro 2048 kun 12 puŝataj mil-tonelaj barĝoj





Malgranda kajo de Jangzi-rivero

pasinteco 20 tagoj estis bezonataj. Por ir-reire veturi tra 1125 kilometroj de Vuhan al Ŝanhajo, 12 tagoj estis bezonataj en la pasinteco, sed nun 5 tagoj sufiĉas se per ekspresa ŝipo. Dank' al plenumo de dragado de la riverbuŝo, nun pli-grandiĝis la navigebleco, kaj kiam ni veturis en la malsupra parto de la rivero, ni vidis proprakule, ke 24,000-tonela ŝipo Daqing N-ro 62 plensarĝita per nafto veturas de sur maro al Nankino. Nun disvolviĝadas tia interligita transporto surmara kaj surrivera. La granda poeto Li Baj de Tang-dinastio revis, ke li traveturos mil liojn en unu tago tra Jangzi-rivero. Nun post la signalo donita por la marŝo de modernigo de niaj agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj teknikoj, tiu revo estas efektiviĝanta.

“Hodiaŭ oni vidas la belan aspekton de la rivero”, diris iu veterana maristo, “tamen ne scias kiel penlaboradis la konstruantoj de la naviga vojo.”

Li diris, ke en la komenca periodo post la fondo de la popola respubliko, tre malfacile laboris la mezurantoj de la danĝeraj rapidfluejoj. En ordigado de la naviga vojo, oni aplikis multajn mirindajn rimedojn netroveblajn en libroj. En interparolado kun veteranaj konstruantoj de la naviga vojo ni informiĝis pri la karakterizaĵo de tiuj laboristoj: Plejparto de iliaj patroj estis veteranaj ŝipistoj. Ili amas la riveron, ĝin konas tre bone kaj forte deziras ĝin reformi. Tial ili montris grandajn kuraĝon, saĝon kaj talenton en sia batalo kontraŭ la malfacilaĵoj en navigvoja konstruado.

Ili malfermis la kluzon de sia memoro kaj priskribis por ni siajn travivaĵojn en la konstruado. Iu libro notas, ke en la jaro 1543 giganta roko sur la rokmuro de Kingtan ruliĝis en la mezon de la rivero, obstrukcis la fluejon kaj formis tie rapidfluejon kun granda akvonivela diferenco. En 1956, iu fremdlanda specialisto pririgardis tiun lokon, sed nur levis la ŝultrojn

kaj foriris kun sento de venkito. Tamen en la sekvanta jaro post lia foriro, laboristoj eltrovis mirindan rimedon por diseksplodigi la rokegon kaj poste formovis la ŝtonojn en la fluo.

Kiam nia ŝipo Jiangxia kviete trapasis la fluejon ĉe Kongling, mi ne povis imagi al mi, kiel danĝere estis por ŝipoj trapasi tiun rivervojon kun nur duona larĝeco de la nuna. Nia gvidisto Maljuna Liu ekmemoris, je vido de tiu loko okazintajn indignigan kaj ĝin rakontis al ni:

“Antaŭ tre tre longe, ankaŭ tie granda rifo en la rivero dividis ĝin en du torentajn branĉojn, kies muĝado estis aŭdebla je 20 kilometroj fore. Tie ofte okazis akcidentoj. Tiam cirkulis popola diro: ‘Kintan estas ne tre danĝera, Kongling estas vere infera.’ Foje iu fremdlanda ‘orserĉisto’ veturis tien per motorŝipo kaj perforte devigis Ĝang Lajzi, kiu bone konis la fluejon, piloti por li. Kiam la ŝipo venis al Kongling, Ĝang direktis ĝin laŭ sia sperto al la giganta rifo, por sekure ĝin eviti. Sed la stulta ŝipestro suspektis, ke Ĝang intencis kaŭzi akcidenton kaj kriis terurite: ‘Ne, ne!...’ Li kruele puŝis Ĝang en la riveron kaj la ŝipo frapiĝis kontraŭ la rifo kaj dronis.”

La gvidisto diris: “Post la Liberiĝo, laboristoj detruis subakve la rifon per eksplodaĵo, forigis

ĝin en kunagado de dragŝipo kaj plilarĝigis la riveron.” Kiam nia ŝipo traveturis tiun lokon, ni jam ne povis aŭdi tondran muĝadon de la akvo sed aŭdis nur plaŭdojn de ondoj frapantaj la ŝipon kaj sirenajn signalojn de malproksimaj ŝipoj.

Tie la rivero trafluas la faman kanjonon kun longeco de 200 kilometroj. La imponaj montgorĝoj Hilinghia, Vuhia kaj Kjutanghia staras unu apud alia. En la kanjono tumulte torentas la fluo kun akvoturniĝoj kaj la rokmuroj de Kujmen kun alteco de cent metroj staras ĉe Bajdiĉeng. Nia fama poeto Du Fu ĝin priskribis per jenaj vortoj: “Pasejon Fuguan ŝlosas pluraj akvoj, kaj Kujmen plej imponas en la mondo.” En tiu danĝera navigejo, laboristoj starigis navigajn semaforojn kaj reton de informado pri la ŝanĝiĝo de la riverfluo kaj konstante interligiĝas surborde kun la preterpasantaj ŝipoj per poŝaj aparatoj radiofonaj.

En la pasintaj 29 jaroj, la heroaj laboristoj ordigis pli ol 140 danĝerajn rapidfluejojn kaj rifejojn, eldragis pli ol 5 milionojn da kubmetroj da teraĵo kaj ŝtonoj. Antaŭe la fluo profundis nur 2.1 metrojn en sezono de malabundeco de akvo, kaj estis trapasebla nur por sola ŝipo, sed nun ĝi jam pliprofundigis ĝis 3

Haveno Vuhan




metroj kaj povas tralasi du ŝipojn. Dank' al tio, la cirkula periodo de la ŝipoj en tiu regiono mallongiĝis je du trionoj. Kaj krome, oni entreprenis grandiozan rektigon al kurba fluejo de la meza parto de la rivero kaj per tio mallongiĝis la vojon je 80 kilometroj.

En la lastaj du jaroj, oni ankaŭ konstruis barojn por preventi enruliĝon de ŝtonoj el montorentoj kaj tiamaniere metis bazon por pliapaŝa bonigo de la naviga vojo.

Post falo de la nokta kurteno, de la bela monturbo Ĉongking ĝis Ŝanhajo ĉe Huangpu-rivero, ekbrilas la aŭtomataj semaforoj laŭlonge de la granda rivero per ruĝaj kaj verdaj lumoj, kvazaŭ miloj kaj miloj da steloj estus falintaj de la Laktovojo. En la lasta tempo, oni komencis prove instalii novtipajn flosantajn navigajn semaforojn el fortikigita vitro, semaforojn supren kaj malsupren moveblajn sur relo, surbordajn neontubajn semaforojn kaj semaforojn kun sunopilo. Klopodoj estas farataj por starigi novan semaforan sistemon aŭtomatan.

Dum nokta navigado ni ŝatis promeni sur la ferdeko. Ni estis absorbitaj de la iluminitaj bordoj kaj rivero kiuj unuiĝis kun la stelplena ĉielo, kaj sentis nin kvazaŭ en mito. En iu antaŭtagmezo, kiam nia ŝipo trapasis la montgorĝon

Montgorĝo Kjutanghia



Vuhia, mi vidis en la direkto montrita de la ŝipestro la mirindan faman "Monton de Diino". Sur la montpinto staras svelta roko tre simila al figuro de knabino, kiu rigardadas al la naviga vojo de Jangzi-rivero. Oni diras, ke tiu montpinto estas transformita de la plej juna filino Jaŭgi de la Okcidenta Diino. Tiu knabino sentis envion pri la homa labora vivo kaj venis al la mondo kun siaj 11 fratinoj por promenado kaj renkontis la antikvan irigacian specialiston Ju, kiu estis gvidanta amasojn en dishakado de Vuŝan-montaro por konduki inundakvon al la maro. Jaŭgi estis kortuŝita kaj tuj helpis Ju en tiu granda laboro. Ŝi deprenis stelojn de sur la ĉielo por lumigi al la laborantoj. Post multaj multaj tagoj, tiuj 12 feinoj turniĝis en 12 montpintojn. . .

Tiu mito estas evidente elpensita de laborantaj popolanoj, kiuj multe suferis de la navigaj malfaciloj kaj danĝeroj. Nun finfine ilia revo efektiviĝis en la socialisma nova Ĉinio. Ĉu la brilaj semaforoj ne tre similas al la steloj deprenitaj de diino Jaŭgi?

Fine ni atingis la lastan stacion de nia vojaĝo la havenurbon Ŝanhajon kuŝantan apud la maro. En la ondetoj de Huangpu-rivero kun la 14 havenaj distriktoj de Ŝanhajo, multaj oceanaj kaj riveraj ŝipoj estis ŝarĝataj kaj malŝarĝataj. Jam ekfunkciis du mekanikaj ŝarĝistoj por karbo kaj lozaj varoj. La aŭtomataj grensuĉiloj kaj karboŝoveliloj forte impresis nin per siaj grandaj kapabloj.

Rapide finiĝis nia agrabla vojaĝo de pli ol unu monato, tamen la belaj pejzaĝoj restas neforgeseblaj en nia memoro, kaj la kortuŝaj scenoj de streĉa laborado kaj la heroaj figuroj de la reformantoj de Jangzi-rivero ankoraŭ agitas kaj stimulas nin kun forto de la muĝanta fluo de la rivero.

Amantoj de Jangzi-rivero


DUM nia vojaĝo tra Jangzi-rivero, ĉie ni renkontis admirindajn labor-modelojn kaj aŭdis rakontojn pri iliaj kortuŝaj agoj, ĉu veturante sur ŝipo aŭ vizitante al iu haveno. Ĝuste dank' al la kreema laboro de ili kaj la vasta amaso de konstruantoj, granda ŝanĝiĝo okazis al Jangzi-rivero kaj tra ilia energia klopodado por modernigi la surakvan transportadon, ni vidis pli belan estontecon de la konstruado de Jangzi-rivero.

Ĉi tie ni volas prezenti al vi du el tiaj avangardoj.

La kreinto de semaforoj

Je falo de la nokta kurteno, tuj ekbrilas la navigaj semaforoj laŭlonge de Jangzi-rivero. Ili

disradias kiel brilaj diamantoj sur rokmuroj kaj sur la akvosurfaco. Ja kiu scias, kiel Inĝeniero Ĉen Hinĝi kaj liaj kolegoj kaprompadis por tio! Maljuna Ĉen nun havas aĝon de 64 jaroj. En la malnova socio, li vivis kiel metilernanto ĉe horloĝisto kaj kiel servisto sur fremdlandula ŝipo. Li vidis propraokule la mizeran staton de navigado de la malnova Ĉinio kaj deziregis ŝanĝi la postĝintecon de neebleco de nokta navigado. Sed kiel povus efektiviĝi lia nobla ambicio en la malnova socio? Li ŝatis esplori horloĝojn kaj fervore sin donis al tekniko jam de sia knabeco. Post la Liberiĝo li estis akceptita en la vicaro de sciencaj esplorantoj de trafikado. En la jaroj de la Granda Antaŭensalto li sukcesis elfari elektran navigan semaforon direktatan de



Ĉen Hinĝi (la tria de dekstre)

horloĝa maŝino. Kaj de tiam la kerosenaj semaforoj estis anstataŭitaj per aŭtomataj elektraj semaforoj.

Por krei pli modernan tipon de semafora lampo, Inĝeniero Ĉen veturis dekmilon da kilometroj por fari enketadon tra riveroj kaj lagoj kaj kolektis riĉan materialon. Li klopodis por elfari novajn signallampojn de forta lumo kaj malgranda povo aplikante avangardajn teknikojn en- kaj eksterlandajn. La signallampo por alterna kaj kontinua kurento eksponata antaŭ nelonge en la Ĉina Eksperta Foiro en Kantono estas unu el liaj kreaĵoj.

En 1972, Ĉen vidis specon de ksenon-kriptona lampo fremdlanda. Li trovis, ke ĝi similas al fulmlampo uzata en fotado, tial li petis helpon de spertuloj de fotilo-fabriko. Post projektado kaj eksperimentado de unu jaro, fine li sukcesis elfari ksenon-kriptonan navigan signallampon taŭgan por niaj navigaj vojoj.


Foje, la gvidantoj donis al li la taskon elfari inkandeskan lampon de malpli ol du voltoj kun simpla cirkvito, facile ripareblan kaj taŭgan por lumigi distancon de 70 metroj. Por solvi la kontraŭdiron inter malalta tensio kaj forta lumeco, Inĝeniero Ĉen faris 18 eksperimentojn pri diversaj lampotipoj. Tage li faris kalkulojn en laboratorio kaj nokte li faris provadon kune kun siaj kolegoj sur lagbordo. Lia edzino diris al aliaj: "Maljuna Ĉen pli profunde amas la lampojn ol siajn familianojn."

Iun nokton fine la lampo ekdisradiis fortan brilon en pluvo. Kaj kiam ili revenis al la hejmo jam vidiĝis aŭroro.

Por oportuno de pasaĝeroj

Sur la ŝipo Jiangxia, per kiu ni veturis de Vuhan al Ĉongking, sin trovis fama labormodelo Liu Ĝengking. Ŝia hararo jam griziĝis, tamen ŝi ĉiam entuziasme servadis al pasaĝeroj.

Iun tagon, nia ŝipo veturis de Hangoŭ al Jiĉang. Antaŭ malankrado, ŝi trovis ke iu lama pasaĝero kun lambastonoj enŝipiĝis kun knabo, kaj ŝi tuj helpis lin trovi lian kajuton. Survoje, ŝi portadis manĝaĵojn kaj teon al li kaj helpis la



Liu Ĝengking kaj Juna Ju

knabon en banado kaj vestoŝanĝo. Kiam la ŝipo atingis Jiĉang, Liu Ĝengking meminciate ordigis la valizon por la patro kaj filo kaj helpi ilin elŝipiĝi. Tion vidinte, ŝipano Malgranda Liu tre kortuŝiĝis kaj diris al ŝi: "Vickomisarino, vi ja tre laciĝis de la tagaj laboroj, do mi ilin helpu anstataŭ vi!" Tion aŭdinte, la pasaĝero kaptis la manon de Liu per siaj tremetantaj manoj kaj diris forte ĝin premante: "Maljuna fratino, nur nun mi ekscias, ke vi estas gvidanta kadro. Servante al la pasaĝeroj vi donis apartan zorgon al mi, ja kiel mi povus vin danki laŭmerite!"

Efektive Liu Ĝengking jam informiĝis survoje, ke la pasaĝero kripliĝis pro laboro, kaj ŝi diris al li: "Vi faris meritoplenan laboron por la popolo, mi ja devis fari kion mi faris por helpi vin en venko de malfacilo."

Tiu vickomisarino laboris kiel infan-laboristino ĉe kapitalisto en la malnova socio, kiam ŝi estis nur 8-jara. La Kompartio savis ŝin el la maro de suferoj kaj kulturis ŝin en laboranton sur ŝipo. Antaŭ tri jaroj, ŝi estis nomumita vickomisarino de la ŝipo Jiangxia.

Kiam Liu Ĝengking eklaboris sur la ŝipo, ŝi servis la pasaĝerojn kun varma koro kaj ĉiuj diris, ke ŝi estas bona knabino. Poste, kiam ŝi fariĝis pli aĝa, oni nomis ŝin bona fratino. Kaj nun la pasaĝeroj nomas ŝin kun dankemo "nia bona onklino".

Fariĝinte vickomisarino, Liu Ĝengking ĉiam estas rigora al si mem. Ŝia filino Taŭ Li laboras en Vuhan kaj ĉiujare pasigas sian ripoztempon en Ĉongking. Ĉiufoje kiam ŝi devis veturi per Jiangxia, Liu Ĝengking aĉetis bileton por sia filino, ke ŝi ripozu en kajuto por pasaĝero, kaj krome ankaŭ igis ŝin partopreni en servado sur la ŝipo. Iu diris al Liu: "Vickomisarino, vi havas kajuton sur la ŝipo kaj povas kunporti la filinon en vojaĝo, kial do aĉeti bileton por ŝi?" Tamen ŝi persistas fari laŭ la regularo.

Ŝi jam laboris 24 jarojn sur Jangzi-rivero kaj veturis ĉ. mil fojojn surŝipe. Iuj patroj kaj patri-

noj komisiis al ŝi siajn infanojn, kiuj devis forveturi sen ilia akompano; kaj iuj beboj naskiĝis surŝipe sub ŝia flegado. Kaj iu el tiaj pasaĝeretoj estis knabino Ju Hiaŭvej, kiu post finstudo en mezlernejo hazarde estis asignita al Jiangxia kiel surŝipa laboranto. Kiam ŝi renkontiĝis kun Liu Ĝengking, ŝi diris: "Ĉu vi ankoraŭ memoras, onklino Liu, ke mi veturis sub via zorgo al miaj gepatroj en Ŝanhajo por tie pasigi somerajn feriojn, kiam mi estis 9-jara." Liu Ĝengking longe ŝin pririgardis kaj diris skuante la kapon: "Mi jam ne memoras." Tamen ŝi ĝoje ĉirkaŭpremis la knabinon.



*Helpo al maljuna
pasaĝero*

Vizito al Fabriko de Artefaritaj Diamantoj

LA Fabriko de Artefaritaj Diamantoj de la Orienta Distrikto de Pekino estas malgranda. Pro bona kvalito de siaj produktaĵoj ĝi ricevis honorflagon kaj dankleteron senditajn respektive de la olekampoj Daking kaj Ŝengli. Ili laŭdis ĝin, ke ĝi faris kontribuon por la disvolviĝo de nia petrola industrio.


En la pasinteco la plejparto de la diamantaj boriloj uzataj de nia lando estis importita. Por kontentigi la bezonon de disvolviĝo de nia petrola industrio, la nomita fabriko akceptis la taskon fabrikii diamantajn aglomeraĵojn bezonatajn por produkti borilojn en la fino de 1975. Dank' al sia klopodado ĝiaj laboristoj sukcesie tion elfaris.

Nun la fabriko povis produkti ne nur ordinarnajn sed ankaŭ altkvalitajn diamantojn. En la lasta jaro ĝi produktis pli ol 40,000 diamantajn aglomeraĵojn por subteni la olekampojn Daking, Ŝengli, Dagang, Karamai, Siĉuan k.a. kaj ricevis varman laŭdon de la tieaj putoboristoj. Krome ankaŭ la diamantaj radoj kaj dentistaj boriletoj faritaj de tiu fabriko estas ŝatataj de la uzantoj.

La fabriko fondiĝis en la jaro 1966. Antaŭe ĝi estis nur malgranda entrepreno starigita de la kvartala loĝantara komitato.

Fan Ĝenghuj, laboristino de la kvalitokontrola grupo kaj unu el la fondintoj de la fabriko, rakontis al mi, kiel oni fondis la fabrikon.

Diamantaj iloj produktitaj de la Fabriko de Artefaritaj Diamantoj



Preventi kaj forigi plantmalsanojn kaj fiinsektojn per vivestajoj

de HUA VEN


RIMARKINDAN sukceson nia lando akiris en esplorado kaj praktikado de preventado kaj forigo de plantmalsanoj kaj fiinsektoj per vivestajoj en la lastaj jaroj. Nun en nia lando jam 6,600,000 hektaroj da kampoj estas flegataj per tiu metodo.

Tiu metodo estas grava en sinteza protektado de plantoj. En diversaj lokoj de nia lando, oni provis mortigi fiinsektojn per insektoj, bakterioj kaj antibiotiko. Tia metodo kaŭzis nenian malutilon al homoj nek median polucion kaj ĝi estas bonefika kaj malmulte kosta.

En 1972 oni komencis apliki tiun metodon grandskale al 80,000 hektaroj da kampoj. De tiam la areo rapide plivastiĝas, kaj tio ludas aktivan rolon en la disvolvado de agrikultura kaj forstokultura produktado.

Antaŭ tre tre longa tempo nia lando jam komencis ekstermi fiinsektojn per iliaj naturaj

malamikoj. Historiaj notoj diras, ke antaŭ pli ol 1600 jaroj en la sudo oni mortigis pentatomojn per flavaj formikoj por protekti mandarinojn. Sed nur post la fondiĝo de la nova Ĉinio komenciĝis grandskala kaj laŭplana esplorado kaj aplikado de tiu metodo. Niaj entomologoj kaj mikrobiologoj faris enketadon pri naturaj malamikoj de la ĉefaj fiinsektoj en nia lando kaj esploron pri ties specioj, dislokiĝo, evoluo kaj utiligebleco, en strikta ligo kun la praktika agrikultura kaj forstokultura produktado. Inter la multe utiligataj insektoj kiuj manĝas fiinsektojn troviĝas sep-stelaj kokcinoj, mantoj, formikoj, vaspoj kaj araneoj; inter la fiinsektaj parazitoj troviĝas ruĝokulaj burdoj (*Trichogramma evanescens*), oraj burdoj, platventraj burdoj (*Anastatus gastropachae*) kaj similaj. Bonaj rezultoj estas atingitaj en utiligo de tiuj insektoj en ekstermado de fiinsektoj kontraŭ rizaj kaj maizaj



Mezurado de forteco de artefaritaj diamantoj

En tiu tempo la nomita kvartala loĝantara komitato transpostenigis de siaj aliaj fabrikoj dekelkajn junajn laboristojn kun meznombraga aĝo de malpli ol 20 jaroj, kaj tiel starigis la malgrandan fabrikon en iu malnova domo kun tri ĉambroj per fonduso akumulita de siaj industriaj entreprenoj.

Tiuj junaj laboristoj havis nenian sperton en farado de artefarita diamanto. Por kiel eble plej rapide produkti ĝin, ili unuflanke konsultis koncernajn sciencajn institutojn kaj aliflanke vizitis fabrikojn por elfari ekipaĵojn. Dank' al sia klopodo de kelkaj monatoj, ili sukcese elfaris specialan premilon kaj ankaŭ elfaris aliajn spe-

plantoj, kotonujoj, sukerkanoj, fruktarboj, legomoj kaj forstoj. En 1977 oni disvastigis la bredadon de ruĝokulaj burdoj sur areo de 600,000 hektaroj.


Ekzemple, en la gubernio Liuhe de Gilin-provinco, kie la ĉefa grenplanto estas maizo, oni kulturis grandkvante ruĝokulajn burdojn laŭ fabrika metodo kaj atingis bonan rezulton en ekstermado de maizaj piralidoj per ili. La piralaj ovumas koncentre nur en kelkaj tagoj. Dum tiu

Generi ruĝokulajn burdojn per disvolvo de kverkaj silkraŭpoj



tempo la Eksperimenta Stacio de Perestaja Ekstermo de Fiinsektoj de la Gubernio Liuhe ellasas grandnombre ruĝokulajn burdojn, kiuj kutime metas siajn ovojn en tiujn de piralaj, por detrui piralajn ovojn. En kunlaboro kun la Plantprotekta Instituto de la Agronomia Akademio de Gilin-provinco, la nomita stacio projektis kaj konstruis fabrikon por duonaŭtomate generigi kaj konservi ruĝokulajn burdojn. Ĝi povas produkti pli ol 400 milionojn da burdoj ĉiutage.

Laborantinoj observas eloviĝintajn burdojn.



cialajn ekipaĵojn el uzitaj materialoj. Per tio ili elfaris siajn unuajn artefaritajn diamantojn.

Fan diris, ke post kelkaj jaroj ili plivastigis la fabriksdomon kaj aldonis ekipaĵojn. Samtempe ili faris kelkcent eksperimentojn kaj trovis malsamajn receptojn de malsamaj krudmaterialoj kaj serion da sperto en produktado tiel ke la kvalito kaj kvanto de la produktaĵoj senĉese altiĝis.

Manipulisto Tang Jagie kiu partoprenis en la fabrikado de diamantaj aglomeraĵoj, diris al mi, ke dum la komenca provado ili malsukcesis multajn fojojn kaj iuj el ili eĉ deprimiĝis. Tamen, multaj laboristoj konsciis ke oni devas klopodi

por venki malfacilojn kaj fari sian kontribuon por disvolvi nian industrion.

En la jaro 1977, iu unuo fabrikis borilojn el iliaj diamantaj aglomeraĵoj, kiuj superis kvalite tiujn el aglomeraĵoj de naturaj diamantoj. Je la 23-a de januaro de la kuranta jaro, per tia borilo putoboristoj de Daking-olekampo kreis rekordon de totala borlongeco atingita per unu borilo en la tuta lando.

La fabriko estis honore titolita kiel Daking-tipa entrepreno de la urbo Pekino en 1977.

Dank' al kunlaboro de pli ol cent komunumaj kaj brigadaj prognozpunktoj la nomita stacio

Subskribo de Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio

LA Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio estis subskribita en Pekino je la 12-a de aŭgusto kaj ĝiaj sankciaj dokumentoj estis interŝanĝitaj en Japanio kaj la traktato komencis validi je la 23-a de oktobro.

La Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio montras: La Ĉina Popola Respubliko kaj Japanio kontente retrorigardis tion, ke la amikaj rilatoj inter la du registaroj kaj la popoloj de la du landoj multe disvolviĝis sur nova bazo, depost la publikigo de la Komuna Deklaro fare de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la registaro de Japanio en Pekino je la 29-a de septembro, 1972; ili konfirmas, ke la supre menciita Komuna Deklaro estas la bazo de la pacaj kaj amikaj rilatoj inter la du landoj kaj ke la principoj montritaj en la Komuna Deklaro devas esti rigore observataj; ili konfirmas, ke la principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj devas esti sufiĉe respektataj; ili esperas fari kontribuojn al la paco kaj stabileco en Azio kaj en la mondo kaj decidis kontrakti pacan kaj amike-

can traktaton por solidigi kaj disvolvi la pacajn kaj amikajn rilatojn inter la du landoj.

La registaro de nia lando ĉiam volas starigi kaj disvolvi rilatojn kun ĉiuj landoj sur la bazo de la kvin principoj de paca kunekzisto. Kvankam malsamaj estas la sociaj sistemoj de Ĉinio kaj Japanio, tamen, pacaj kaj amikaj rilatoj devas kaj povas esti starigitaj inter ili sur la bazo de la kvin principoj de reciproka respekto al suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neagreso, reciproka neinterveno en internajn aferojn, egaleco kaj reciproka utilo kaj paca kunekzisto. La traktato difinas, ke Ĉinio kaj Japanio starigos "longdaŭrajn, pacajn kaj amikajn interrilatojn" kaj "solvos ĉiujn disputojn en la interrilatoj per pacaj rimedoj, sed neuzo de kaj neminaco per arma forto". La starigo kaj disvolvo de tiaj longdaŭraj, amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio, kiuj havas proksimume miliardon da loĝantoj, sendube estas fortega kaj pozitiva faktoro por defendi pacon, sekurecon,

povas ekzakte prognozi la fiinsektan ovumadon en la gubernio kaj ĝustatempe ellasi ruĝokulajn burdojn. En 1977, tiu metodo estis aplikata al 16,000 hektaroj da kampoj, t.e. 80% de la totala areo de la maizkampoj. En la tuta gubernio nun oni jam ne plu uzas kemian insekticidon. Dank' al apliko de la insektoekstermantoj saviĝis miloj da tunoj de detruita maizo en ĉiu jaro. Kaj pro tiu sukceso oni laŭdis ĉi-jare la gubernion en la Tutlanda Scienca Konferenco okazigita en Pekino.

Nuntempe ruĝokulaj burdoj estas utiligataj en multaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj por protekti maizojn, rizplantojn, sukercanojn, sojfabojn, pinojn, persikujajn kaj tiel plu de atako de fiinsektoj. Ankaŭ en Ŝunji-gubernio, antaŭurbo de Pekino, oni po-grande produktas ruĝokulajn burdojn laŭ fabrika metodo. Pasintjare pli ol 3,300 hektaroj da maizo estis sub la protekto de burdoj kaj 80% de la piralaj ovojn estis neniigitaj.



Subskribo de la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio

stabilecon kaj prosperon en la tuta Azio kaj la Pacifika Regiono.

Nun, la hegemoniistoj senbride tiranas en la mondo, ĉie praktikas agreson, intervenon, ekspansion kaj ŝtatrenverŝon. Tial batalo kontraŭ hegemoniismo estas unu el la ĉefaj taskoj nuntempaj en la defendo de paco kaj ankaŭ grava parto de la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio. La traktato kondiĉas, ke "neniu el la du landoj devas ĉasi hegemonion en la Azia kaj Pacifika Regiono aŭ en iu ajn alia regiono kaj ke ili oponas kontraŭ klopodoj de iu ajn lando aŭ aro de landoj por establi tian hegemonion". Tio konformas al la deziro de la

popoloj de Ĉinio kaj Japanio kaj ankaŭ de ĉiuj pacamaj popoloj de la mondo kaj certe faros profundan influon en la internaciaj aferoj.

La traktato ankaŭ kondiĉas, ke la traktato ne devas influi la starpunkton de ĉiu el la subskribintaj flankoj en rilatoj kun tria lando.

Ĉinio kaj Japanio estas proksimaj najbaroj kaj la amika kontaktiĝo de la popoloj de la du landoj havas longan historion. La subskribo de la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio certe kreos pli vastan perspektivon en la pluropaŝa fortigo kaj akcelo de la rilatoj de amikeco kaj kunlaboro inter la du landoj.

En nia lando oni uzas ankaŭ orajn kaj platventrajn burdojn en la ekstermado de kotonfruktaj heliotidoj (*Heliothis armigera*) kaj liĉipentatomoj.

En nia lando malmulte kosta estas la produktado de parazitaj burdoj, ĉar oni parazitigas ilin al ovoĵoj de ricinaj silkraŭpoj en la sudo kaj ovoĵoj de kverkaj silkraŭpoj en Pekino. Tio cetere akcelas la produktadon de silkraŭpoj. Ankaŭ la ovoĵoj de tritikaj pierisoj (*Gelechia cerealella*) estas taŭgaj por akcepti parazitajn burdojn,

tamen oni devas perdi multon da greno por bredi ilin.

En multaj lokoj oni ekstermas fiinsektojn per ĉasinsektoj. Henan-provinco utiligas kokcinelojn en forigo de kotonafidoj en 280,000 hektaroj da kampoj, t.e. duono de la kotonkampoj. Aliaj provincoj utiligas araneojn, formikojn, anasojn, ranojn ktp. en ekstermado de fiinsektoj.

Granda sukceso estis akirita en nia lando ankaŭ en utiligado de bakterioj por forigi fiinsektojn kaj kuraci plantmalsanojn.

Per Esperanta por Amikeco

— Noto pri la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj EPC-amikoj


de NIA RAPORTISTO

EN la ĝojegaj tagoj kiam subskribiĝis la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio, ni bonvenigis la Vizitgrupon al Ĉinio de Japanaj Amikoj de EPC. Estro de la grupo S-ro Tokuda Rokuro estas peranto de El Popola Ĉinio en Japanio, kiu jam dufoje vizitis Ĉinion; sekretario de la grupo S-ro Umeda Joŝimi kvankam unuafoje vizitis Ĉinion tamen ankaŭ li, fame konata japana esperantisto, longtempe varbis abonantojn por nia gazeto kaj estas nia malnova amiko. Ilia vizito portis profundan amikecon de la japanaj popolo kaj esperantistoj al la ĉinaj popolo kaj esperantistoj. En la 18-a de aŭgusto, kiam la japanaj geamikoj atingis Pekinon, S-ro Tokuda diris al mi: “Mi tre ĝojas, ke ni povas viziti Ĉinion tuj post la subskribo de la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj

Japanio, tio havas grandan signifon.” Ankaŭ S-ro Koseki diris: “Ĉinio kaj Japanio estas najbaroj dividitaj nur de akvostrio, kaj ni devas esti amikoj de generacio al generacio.”

La unua esperanta tago

La vizito al Ĉinio fare de la japanaj esperantaj geamikoj ricevis varman bonvenigon de Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), la Redakcio de El Popola Ĉinio kaj aliaj ĉinaj geesperantistoj. Tagmeze de la 19-a, Guozi Shudian kaj la Redakcio de El Popola Ĉinio kune donis festenon honore al la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj Amikoj de El Popola Ĉinio kaj esprimis varman bonvenigon al ĝi pro ĝia vizito al Ĉinio en la tagoj, kiam subskribiĝis la Paca kaj



Interparolo kun la-
borantoj de EPC

Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio kaj dankon al ĝi pro tio, ke ĝi portis amikecon de la japanaj popolo kaj esperantistoj al ni. La gastoj kaj gastigantoj de tempo al tempo tostis pro la amikeco inter la ĉinaj kaj japanaj popoloj kaj esperantistoj.

Posttagmeze de tiu tago, okazis bonveniga kunveno en Kianmen-hotelo, kie loĝis la japanaj gastoj, kaj tie ambaŭlandaj geesperantistoj intime interparolis. Iuj ĉinaj veteranaj esperantistoj rememoris pri la amikeca kontaktado inter la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj, precipe pri la forpasinta fame konata japana esperantistino Verda Majo, kiu persistis en justeco, simpatiis kaj subtenis la ĉinan popolon en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito. Tio vekis profundan sopiron al ŝi ĉe la kunvenantoj. S-ro Tokuda donacis, en la nomo de Japana Esperanto-Instituto, al la Redakcio de El Popola Ĉinio kopion de «La Mondo», esperanta periodaĵo eldonita de Ĉinio en la tridekaj jaroj, kaj legis la leteron de S-ro Egami Fujio, prezidanto de JEI, al la Redakcio de EPC. La letero diras: “. . . Ni esperas ke tio ĉi simbolas unu plian paŝon de la amikeca kunlaborado inter la ĉina kaj japana popoloj. Aparte, ni deziras pli ampleksigi la kontakton inter esperantistoj en Ĉinio kaj Japanio, tiel ke ni kune povos kontribui al la profundigo de kompreniĝado inter popoloj de la mondo.” F-ino Nakamura en la nomo de esperantistoj de Oomoto legis la salutleteron de S-ro Ito Eizo; S-ro Nagaoka transdonis al Radio Pekino kompletan da kasetoj de ĉiuj ĝiaj esperantaj elsendaĵoj registritaj de S-ro Muramacu en Japanio. Poste S-ino Kaneko kantis en la ĉina lingvo la ĉinan kanton “Blovos Norda Vent’”, F-ino Nakamura kantis en la japana lingvo la japanan kanton “Sakuroj”, kaj la ĉinaj geesperantistoj kantis en la japana lingvo japanan popolan kanton «Fiŝkaptista Kanto». . . Ĉio ĉi tio vekis varman manklakadon de la ĉinaj kaj japanaj geesperantistoj, kaj la bonveniga kunveno gaje fermiĝis per la himno “La Espero”.

Vespere, K-do Hujucz, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, donis bankedon en Hinkiaŭ-hotelo honore al la japanaj geesperantistoj. Ankaŭ K-do Ĵelezo, vicprezidanto de ĈEL,



Interparolado pri Verda Majo

ĉeestis la bankedon. Tio multe kortuŝis la membrojn de la vizitgrupo. La gastoj kaj gastigantoj interkonsiliĝis en la bankedo pri la perspektivo de la disvolviĝo kaj interkontaktado de la esperanta movado inter Ĉinio kaj Japanio. La bankedo iris en intima kaj senĝena atmosfero.

Sur la revena vojo al la hotelo, la multe ekscitiĝintaj japanaj amikoj diris, ke tiu tago estas “la unua esperanta tago” en Ĉinio.

Per Esperanto por amikeco

La vizitgrupo intervidiĝis kun K-do Bakin en Ŝanhajo. Intervidiĝi kun K-do Bakin estas multjara deziro de S-ro Tokuda. K-do Bakin ne nur estas fame konata verkisto, sed ankaŭ, kiel esperantisto, gvidis la esperantan movadon de Ŝanhajo en la dudekaj kaj tridekaj jaroj kaj batalis por la revolucio per Esperanto kiel armilo.

En la salono de Gingiang-hotelo de Ŝanhajo, Bakin kaj aliaj kvar ŝanhajaj esperantistoj faris intiman interparoladon kun la japanaj geamikoj. S-ro Tokuda diris: “Ni japanaj geesperantistoj havas grandan plezuron intervidiĝi kun S-ro Bakin. Ĉar S-ro Bakin ne nur faris kontribuojn en literaturo pro kio li ĝuis bonan reputacion en Japanio, sed ankaŭ akiris grandajn sukcesojn en politiko.” Poste la ĉinaj kaj japanaj geesperantistoj retrorigardis la ŝanhajan esperan-

tan movadon en la dudekaj kaj tridekaj jaroj. Tiam, K-do Bakin redaktis en Ŝanhajo esperantan gazeton «Verda Lumo», ĉinigus la esperantan romanon de J. Baghy «Printempo en la Aŭtuno» ktp. Kaj samtempe, ili multe parolis pri la aktivado de la fame konata japana esperantistino Verda Majo en Ŝanhajo. Fine, laŭ propono de la japanaj amikoj ĉiuj ĉeestantoj subskribis sub la vortoj «Por amikeco inter ĉina kaj japana popoloj» kaj ĉiu rezervis ĉe si po ekzemplero kiel kara memorajo.

Kortuŝa sceno pri servo de Esperanto por amikeco aperis ankaŭ en la Geknaba Domo de Hongkou-kvartalo de Ŝanhajo, kiam la japanaj geamikoj ĝin vizitis. Post rigardo al ĉambroj por diversaj aktivadoj kaj arta prezentado, la japanaj amikoj revenis al la akcepta ĉambro, kie jam sidis en atendo pli ol dudek geknaboj. S-ro Takahaŝi skribis sur la nigra tabulo unue «Per Esperanto por Amikeco», kaj «Bonan matenon», «Kio estas via nomo» kaj aliajn simplajn frazojn en Esperanto kun ĉina traduko. F-ino Nakamura voĉlegis kaj la lernantoj sekvis. Poste, la japanaj geamikoj ĉiuj iris al la lernantoj, manpremis kun ili kaj faris simplan konversacion kun ili per la ĵus lernitaj vortoj. Poste, F-ino Isobe, en formo de respondo al

miaj demandoj, prezentis al la lernantoj la membrojn de la vizitgrupo. Sekretario S-ro Umeda speciale konigis al ili kio estas Esperanto, kaj instruis al ili ĝian alfabeton kaj la alfabetan kanton de Esperanto. Fine, la japanaj geamikoj donacis al la lernantoj balonojn kun desegno de verda stelo de Esperanto kio simbolas Esperanton kaj amikecon.

Kiam la japanaj gastoj bedaŭre forlasis la Geknaban Doman, la lernantoj adiaŭis la gastojn per «Ĝis revido!» en Esperanto mansvingante la balonojn. Grupestro S-ro Tokuda kaj aliaj japanaj geamikoj ĝoje kapjesis kaj respondis en Esperanto: «Ĝis revido, ĝis!»

Neforgesebla renkontiĝo

En la 18-a de aŭgusto, inter la bonvenigantoj sur la Pekina Aerodromo al la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj Amikoj de El Popola Ĉinio du gejunuloj estis neesperantistoj. Ili estas la gefiloj de la forpasinta japana esperantistino Verda Majo — amikino de la ĉinaj popolo kaj esperantistoj. Ili speciale venis tien por bonvenigi sian onklinon, membron de la vizitgrupo, S-inon Ozaŭa Juki, pliaĝan fratinnon de Verda Majo.

«Jen la onklino!» La genevoj rapidis al ŝi. En la pasintaj pli ol tridek jaroj ili neniam ricevis



*En Mejjuan Hincun
en Nankino*

informon unu de alia, kaj la parencoj nun renkontiĝis en Ĉinio. S-ino Ozaŭa eklarmis pro emociiĝo. Ŝi esprimis sian dankon al la koncernaj organizoj de Ĉinio kiuj helpis ŝin en la intervidiĝo kun la genevoj.

En la vizitgrupo troviĝis japana verkistino F-ino Saŭaĉi Hisae. Ŝi ne estas esperantistino, tamen, por akceli la amikecon inter Ĉinio kaj Japanio, ŝi akompanis S-inon Ozaŭa en tiu ĉi vizito kiel membro de la vizitgrupo kaj planis verkon pri Verda Majo. Ŝi kaj S-ino Ozaŭa estis tiel intimaj kvazaŭ fratinoj. Ŝi diris al mi: "La ĉinaj amikoj estas tiel bonaj al mi, kvazaŭ mi estus ŝia parenco."

Verda Majo, nun jam bone konata de ĉinaj kaj japanaj esperantistoj, ofte fariĝis unu el iliaj paroltemoj.

Kiam la vizitgrupo atingis Ŝanhajon, S-ino Ozaŭa tre emociiĝis. Ĉar ŝi venis al la loko kie ŝia kara fratino siatempe batalis. Kaj la sceno de ŝia disiĝo kun la fratino ekaperis en ŝia menso:

En la jaro 1937, por batali kontraŭ la agresado de japanaj imperiistoj al Ĉinio, Verda Majo decideme forlasis sian patrolandon — Japanion kaj venis al Ŝanhajo de Ĉinio. S-ino Ozaŭa venis al la doko de Jokohama por ŝin adiaŭi. Pro tio ke ŝi volis aĉeti por sia fratino oranĝojn, kiujn Verda Majo tre ŝatis, ŝi forlasis la dokon portempe. Sed kiam ŝi revenis, la ŝipo jam startis, kaj ŝi vidis nur tion, ke ŝia fratino mansvinge adiaŭis ŝin starante sur la ferdeko. Kiu sciis ke la adiaŭo fariĝis la lasta disiĝo por ili. . .

. . .Forpasis 41 jaroj. Ankaŭ mi, la pliaĝa fratino via, venis al Ŝanhajo, kaj kara fratino, ja kie estas vi? . . .

Poste, la verkistino diris al mi, ke S-ino Ozaŭa ofte deziras ke ŝia kara fratino ekaperu inter la homamasoj sur la ŝanhajaj stratoj. Jes, Verda Majo ankoraŭ vivas en la ĉina popolo. Per sia vivo ŝi semis amikecajn semojn kaj nun ili jam floras kaj fruktas.

La dua esperanta tago

En la sekvinta tago, post kiam la japanaj geamikoj revenis de suda Ĉinio al Pekino, la grupo



En la Industria Ekspozicio de Ŝanhajo



Post rigardo de la pup teatraĵo

vizitis Guozi Shudian kaj la Redakcion de El Popola Ĉinio. En Guozi Shudian la gastigantoj faris ĝeneralan prezentadon pri la administracio al la gastoj. Poste la japanaj geamikoj rigardis la laborĉambron de la Esperanta Sekcio. Kiam S-ro Harada trovis sian karton inter la nomlisto de abonantoj, li ekkriis de ĝojo.

Poste la japanaj amikoj veturis al la Redakcio de El Popola Ĉinio. Kunsidis kaj interparolis la gastoj kaj gastigantoj. Antaŭe, la redakcio kaj legantoj komunikiĝis ĉefe per korespondo, kaj

ankaŭ la rubriko "Inter Ni" de la gazeto ludis tian rolon. Sed nun, la redaktoroj povis rekte aŭskulti de la legantoj opiniojn, kritikojn kaj proponojn pri la gazeto. Tio multe ĝojigis la laborantojn de El Popola Ĉinio. En la kunsido, la japanaj legantoj donis siajn opiniojn pri la enhavo, formo, lingvo kaj stilo de la gazeto. S-ro Nagaoka faris iom longan paroladon. Li rimarkigis la ŝanĝiĝojn de El Popola Ĉinio en la lastaj jaroj, dirante ke "Ankaŭ en la Redakcio de El Popola Ĉinio okazis kultura revolucio". Poste li detale elmetis la de li ŝatatajn artikolojn en la sep unuaj numeroj de El Popola Ĉinio en 1978. La malkaŝemaj opinioj donis grandajn kuraĝigojn kaj inspirojn al la redaktoroj. La gastoj ankaŭ rigardis la laborĉambrojn de la redakcio. Ili manpremis al kaj interparolis kun la laborantaj redaktoroj kvazaŭ malnovaj amikoj. La plej juna membro F-ino Isobe diris: "Vidinte la oficejon, mi sentas pli da familiareco al la gazeto El Popola Ĉinio."

Vespere, la ĉinaj kaj japanaj geesperantistoj kune aprecis la mitan pupteatraĵon «Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco» luditan de la Ĉina Pupteatra Trupo en Esperanto. La trupo preparis tiun ĉi pupteatraĵon por partopreni en la Dek-

unua Internacia Pupteatra Festivalo en Zagrebo de Jugoslavio en oktobro de la kuranta jaro. Kvankam la ludado estis prova kaj ĉiuj aktoroj estas komencantoj de Esperanto, tamen la trupo prove prezentis ĝin speciale por akceli la amikecon kaj aŭskulti opiniojn kaj proponojn de la japanaj geamikoj kiel la unuaj fremdlandaj esperantistoj-spektatoroj. La ludado trovis varman bonvenigon kaj kuraĝigon de la japanaj geamikoj. S-ro grupestro Tokuda esperis ke la teatraĵo iam estos ludata en Japanio.

Kvankam multe laciĝis la japanaj geamikoj post pli-ol-dektaga vojaĝo, tamen ili sentis grandan ĝojon. Ili nomis tiun ĉi tagon "la dua esperanta tago" en Ĉinio.

Ĝis revido, geamikoj

Forpasis du semajnoj kaj fine venis la tago por disiĝo. La ĉinaj kaj japanaj geesperantistoj alte taksis la lastan tagon de tiu ĉi kontakto.

Vespere de la 31-a de aŭgusto, la vizitgrupo donis adiaŭan festenon en la Pekina Hotelo honore al la ĉinaj geesperantistoj. En la festeno, la gastigantoj kaj gastoj denove tostis por la



*Sur la Jangzi-rivera
Ponto de Nankino*

amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. S-roj Koseki kaj Takahaŝi la unuaj ekkantis japanan popolan kanton, poste S-ino Kaneko, F-inoj Nakamura kaj Isobe kaj ĉinaj esperantistinoj kune kantis ĉinan kaj japanan kantojn, ankaŭ la gefiloj de Verda Majo kantis ĉinan kanton. En la festeno la plej vigla estis Sekretario S-ro Umeda. Li kantis japanan popolan kanton kun teksto de li adaptita kaj prikantanta Ĉinion kaj poste dancis japanan popolan dancon. Lia ludado rikoltis aklamojn de la gastoj kaj gastigantoj. Fine, Guozi Shudian kaj la Redakcio de El Popola Ĉinio donacis al la japanaj amikoj respektive faksimilon de manuskribo de Prezidanto Maŭ pri Esperanto kaj faksimilon de manskribita

poemo de K-do Guo Mojuo pri la amikeco inter Ĉinio kaj Japanio.

Frumatene de la 1-a de septembro estis neforgesebla momento. Ĉiuj membroj de la vizitgrupo kaj ĉinaj gastigantoj brakumis kaj manpremis unu alian. Sur la aerodromo, ili iris kun granda bedaŭro de disiĝo al la aviadilo, de tempo al tempo retrorigardis kaj salutis mansvinge, kriante "Ĝis revido, ĝis!" en Esperanto kaj en la japana lingvo. Fine ili malaperis en la nokta vualo. Sed ni ankoraŭ vidis malklare, ke Sekretario Umeda ankoraŭ svingadis la verdan flageton antaŭ la enirejo de la aviadilo. . .

Ho, ĝis revido, japanaj geamikoj, ĝis!

Lastaj Vortoj antaŭ Adiaŭo

Rapide forpasis la du semajnoj dum kiuj niaj japanaj EPC-amikoj vizitis nian landon. Jen venis la lasta tago, kaj nia raportisto petis ke ili restigu kelkajn lastajn vortojn antaŭ sia reveno al sia patrolando Japanio. Kaj kompreneble parolis la unua S-ro Tokuda Rokuro, estro de la Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj Amikoj de El Popola Ĉinio.

— La Red.

Estro Tokuda Rokuro



Sekretario Umeda Joŝimi



Koseki Joŝio



Ozaŭa Juki





Nakajima Cizu



Nagaoka Jiro



Takahaŝi Tacuji



Saŭaĉi Hisae

TOKUDA ROKURO: Nia vizitgrupo de japanaj esperantistoj de EPC-amikoj estis varme bonvenigitaj ĉie en Ĉinio de ĉinaj esperantistoj. La subskribo de la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio certe pli profundigos la amikan rilaton inter la popoloj kaj esperantistoj de ambaŭ landoj. Mi dankas kore al ĉiuj esperantistoj kaj koncernaj organizaĵoj kiuj bonvenigis nin. Dankon.

UMEDA JOŜIMI (sekretario de la grupo): La celoj de nia vizitgrupo estis tute plenumitaj. La unua — amikeco — estas forte plifortigita pere de ofta kaj multnombra renkontiĝo kun ĉinaj esperantistoj, kun kiuj ni povis libere kaj intime interparoli kiel bonaj geamikoj. Krome, ni estis varmege bonvenigitaj de ĉinaj popolanoj en diversaj urboj kaj vilaĝoj. La alia celo — turismo — estas kontentige kaj komforte plenumita dank' al la bonega aranĝo de ĉinaj koncernaj instancoj. Vizito al diversaj lokoj kaj kulturvaloraĵoj impresis min freŝe pri Ĉinio la evoluanta. Tia vizito pli ofte okazu de nun. Dankegon al ĉiuj geamikoj!


KOSEKI JOŜIO: La sorto favoris min refoje viziti Ĉinion, kien mia revo ĉiam flugis. Flugis ankaŭ tempo tro rapide for, de kiam ni atingis Pekinon. Kio en Ĉinio impresis min? Tro, tro multe por mencii ĉion. Pekin-operaj teatraĵoj en Nankino tre, pupteatraĵo Sun Vukong en Esperanto precipe. Sed aparte pleje kortuŝis min

la profunda gastamo de vi gesamideanoj. Vivu la amikeco per Esperanto!

OZAŬA JUKI (fratino de Verda Majo): Pro viaj varmaj helpoj mi povis renkonti miajn amatajn genevojn. Mi elkore dankas vin. Dum dekelkaj jaroj ni serĉadis unu la alian. Ili sopiras naskiĝolokon de ilia patrino kaj volegas viziti tien. Bonvolu helpi ilin. Mi kvazaŭ sentas ilin veraj gefiloj. Ankaŭ ili sentas same. Mi pensas, ke la intimiĝo de ili kaj niaj parencoj estas sama de amikiĝo de Ĉinio kaj Japanio, ĉu ne? Mi kortuŝiĝis vidante ĉarmajn geknabojn bonvenigi nin. Mi ĉiam larmiĝis. Ili estu veraj amikoj inter niaj du landoj. Kaj niaj familioj estu ponto de tio.

NAKAJIMA ĈIZU: Mi dankas al vi por via invito kaj bonaj zorgoj. Unue min surprizis via vasta lando, kaj la fakto de ĉiuj virinoj bone laboras. Speciale mi trovis virinan kondukistion de vagonaro. En granda kampo estis aero tre freŝa kaj gelaboristoj kune laboris harmonie. Ili vestoj estas ne tiel bonaj sed ili silente laboris. Mi sentis iliajn fortajn unuigajn korojn.

NAGAOKA JIRO: Ĉinaj popolanoj nun strebas al la kvar modernigoj liberigite de la spirita kateno de la "kvarpersona bando". Ili aspektas tre feliĉaj, gajaj kaj estas gastamaj, precipe esperantistoj. Post dekoj da jaroj la niveloj de ĉinaj sciencoj, teknikoj, agrikulturo k.t.p. atingos tiujn de Japanio. Ĉie ajn, kien ni iris, troviĝis



Harada Ikuo



Nakamura Masumi



Kaneko Haruhi



Isobe Majo

belaj arboj sur stratoj. En ĉinaj vilaĝoj, urboj kaj urbegoj abundas la verdo.

TAKAHAŜI TACUJI: Mia impresio de Ĉinio estas unuvorte dirite "granda", kiel la kolosaj konstruaĵoj ĉirkaŭ Tian-anmen-placo. Tiel granda estas la movado de ĉinaj esperantistoj kiuj eldonas EPĈ al la tuta mondo. En Ŝanhajo, mi estas kortuŝita de la fakto ke Esperanto influas al la historio de nova Ĉinio. Mi estas tre feliĉa kaj agrabla inter ĉinaj gesamideanoj kiuj jam estas najbaraj geamikoj.

SAŬAĈI HISAE:

*Akceptite de multaj homoj
kun rideto kaj varma koro,
mi vidis propraokule
la procedon superegan
de la kombiniĝo
inter homa saĝo
kaj natura riĉo,
kio entute min
impresis freŝe.*

HARADA IKUO: Mi havis intereson pri ĉiuj aferoj, kiel ekzemple vivado de popolanoj, belaj pejzaĝoj, manĝaĵoj kaj aliaj. Ili tre plaĉas al mi. Mi faris promenadojn ĉiutage. Post tagmanĝo mi sole migris sur la stratoj per piedo kaj aŭtobuso. Tiam mi povis rekte rigardi vivon de ĉinaj popolanoj. Mi estis kontenta en la tuta vojaĝo.

NAKAMURA MASUMI: Mi elkore dankas vin pro viaj agrablaj konstantaj prizorgoj. Mi neniam

forĝos la varman bonvenigon kiun ni ricevis en via lando. Mi estis impresita ke ĉinaj popoloj havas memkonscion ke ili laboras por bonigo de sia lando. Tia konscio certe kondukos al sukceso. Ankaŭ mi vidis multajn virinojn kiuj estas ĝentilaj kaj samtempe aktivaj. Ili estis admirindaj. Koran dankon kaj ĝis revido!

KANEKO HARUHI: Unue, mi sentas grandan honoron renkontiĝi kun estimataj veteranaj esperantistoj kiuj instruis al mi kio estas Esperanto-movado pere de ĉinaj malnovaj gazetoj kaj libroj. Due, mi tre ĝojas konatiĝi kun aktivaj esperantistoj kiuj subtenas nuntempan Esperanto-movadon kaj montris amikecon al mi. Trie, mi estas surprizita ke ĉinaj virinoj multe laboras same kiel viroj ne nur en esperantujo, sed ankaŭ en ĉiuj kampoj. Tio stimulas min kaj havigas esperon de egaleco inter virinoj kaj viroj. Japanaj esperantistoj volas scii pri ĉinaj esperantistoj kaj esperanto-movado, kaj post reveno en Japanio, mi klopodos konatigi al ili laŭ mia scio la situacion de la ĉina esperanto-movado kaj miajn novajn geamikojn.

ISOBE MAJO: Dum nia 2-semajna restado en Ĉinio, ĉie ni estis afable bonvenigitaj kaj tio impresis min, precipe varma akcepto de la ĉinaj esperantistoj. Ĉio kion mi vidis aŭ aŭdis estis alloga. Speciale interesa estis la vizito al la redakcio de El Popola Ĉinio. Vidinte la oficejon kie la gazeto naskiĝadas, mi sentas pli da familiareco al la gazeto El Popola Ĉinio.

Raporto pri la 63-a UK al TK de ĈPPIK

La 5-an de septembro, 1978, la Grupo de Internaciaj Aferoj de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco okazigis raportkunvenon pri la 63-a Universala Kongreso de Esperanto.

La kunvenon prezidis Ĉu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de TK de ĈPPIK kaj estro de la nomita grupo. Ĝin ĉeestis Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de ĈPPIK kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, membroj de la Konstanta Komitato de TK de ĈPPIK Vang Junŝeng, Vang Fu, Li Hin, Kju Vu, Ĝong Kiguang kaj Ĉeng Sijuan kaj aliaj membroj de ĈPPIK. Raporton pri la 63-a Uni-

versala Kongreso de Esperanto faris Ĝang Kiĉeng, estro de la Ĉina Esperantista Delegacio.

En sia malferma parolado Ĉu Tunan diris, ke niaj Partio kaj registaro alte taksas Esperanton. En la jaro 1939, Prezidanto Maŭ jam skribis sian opinion pri Esperanto en Jan-an. Post la Liberiĝo de la lando, multaj Esperantaj laboroj estas faritaj: eldoniĝas gazetoj kaj libroj en Esperanto kaj funkciadas Esperanta radiodisaŭdigo. Ĉio tio ludis bonan rolon en disvastigo de Esperanto, diskonigo pri la nova Ĉinio kaj pliprofundigo de la kompreno de diverslandaj popoloj kaj esperantistoj al nia lando. Sed pro la ĝeno de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando" en la pasintaj jaroj, multaj Esperantaj aktivadoj estis ĉesigitaj. Nun, post la frakaso de la "kvarpersona bando", rekomenciĝis tiaj aktivadoj.


En sia parolado, Ĝang Kiĉeng unue prezentis Esperanton, la internacian Esperanto-movadon kaj la historion de la Ĉina Esperanto-movado. Poste li detale rakontis pri la 63-a Universala Kongreso de Esperanto. Li diris interalie: "Post


pli ol dek jaroj, la Ĉina Esperanto-Ligo sendis ĉijare delegacion al la 63-a Universala Kongreso kaj ĝiaj senditoj estis varme bonvenigataj de UEA kaj geesperantistoj de multaj landoj." "Tiu ĉi Kongreso estis multnombre ĉeestata," li daŭrigis, "kaj tre riĉa estis ĝia programo. Dum la Kongreso, la ĉina delegacio interŝanĝis opiniojn kun respondeculoj de UEA pri la internacia Esperanto-movado kaj starigo de amika interrilato. En la Kongreso, la membroj de la ĉina delegacio renkontis multajn malnovajn amikojn kaj rememoris, kun emocia koro, la profundan amikecon en la pasinteco." Kaj fine li diris: "Nun Esperanto estas aplikata multe pli vaste kaj ĝi ludos ĉiam pli gravan rolon en akcelado de la interkompreno de la popoloj kaj la progressa afero de la homaro."

En la kunveno ankaŭ Hujucz faris paroladon. Liaj vortoj kaj la raporto de Ĝang Kiĉeng vekis grandan intereson ĉe la kunvenantoj kaj estis varme akceptataj.

Omaĝa numero de "Ferioj en Rumanio"

Omaĝe al la 20-jara aperado de la monata bildgazeto "Ferioj en Rumanio" aperis ĝia speciala numero en Esperanto en julio de la kuranta jaro. En tiu bele ilustrita gazeto 24-paĝa oni aperigis artikolojn pri la pasinteco kaj hodiaŭo de la turisma afero en Rumanio, pri ĝiaj belaj kaj konstruado de turismaj instalaĵoj. Krome oni ankaŭ donis lakonan informon pri la rumanaĵoj. Ni esperas, ke tiun gratulindan sukceson sekvos eldonado de aliaj esperantaĵoj de Rumanio.





Marbordaj urboj Kingdaŭ kaj Jantaj

Ĉe la bordo de Kingdaŭ

Kingdaŭ estas unu el la plej belaj havenurboj de nia lando kaj ankaŭ la plej granda industria urbo de Ŝandong-provinco. Tiu urbo konstruita sur monteto estas vere pitoreska kun majestaj rokoj, lazura maro, smeraldaj arbaroj kaj belaj domoj. En somero, la tiea vetero ne estas tiel varma kaj ĝi havas tre bonan plaĝon ĉe la marbordo, tial ĝi estas ideala loko por turistoj kaj ripozantoj.

La urbo Jantaj estas ĉirkaŭata de montoj en tri flankoj kaj borderata de la maro Bohaj en la nordo. Post la Liberiĝo, multe disvolviĝis la urbo, ĝiaj kalvaj montoj estas verdigitaj kaj la stratoj kaj kortoj ĝuas verdan ombron dank' al plantado de arboj. Ĝi havas jam industriajn branĉojn de metalurgio, maŝinfabrikado, kemiaĵoj kaj aparatoj, kaj la enladigitaj manĝaĵoj, horloĝoj, vino kaj brodaĵoj produktitaj de ĝi okupas gravan lokon en la eksportado de malpeza industrio de nia lando.



Laŭŝan-monto en ĉirkaŭaĵo de Kingdaŭ



Plago de Kingdaŭ

Nova vilaĝo de elmigrantaj ĉinoj nun revenintaj






Jantaj



Strato de Jantaj

La akvaria muzeo



La pasaĝera stacio ĉe Jantaj-haveno



*Tri-landaj
geesperantistoj
vizitis Pekinon*

En septembro geesperantistoj el tri landoj vizitis Pekinon: S-ino Edna Giles de Aŭstralio, F-ino Amy Nilsson de Svedio kaj S-ro Petro Danke de Hungario.

Ni sentis nin tre feliĉaj pro nia renkontiĝo kun tiuj niaj legantoj kaj geamikoj. Ankoraŭfoje Esperanto pruvis pri sia valoro en nia interkompreniĝo kaj reciproka amikeco.

Forpasis fama japana esp-isto Seiho Nishi

S-ro Seiho Nishi, fama japana esperantisto, forpasis en la 19-a de aŭgusto de 1978.

S-ro Seiho Nishi estis pioniro de la Esperanto-movado de Japanio. En la tempo de la Unua Mondmilito li studis en Germanio kaj poste fuĝis al Francio. Pro lingva malfacilo li eklernis Esperanton. Post kiam li revenis al sia patrolando, li antaŭenpuŝis tiun movadon. Pro tio li estis arestita en la tempo de la Dua Mondmilito. En 1965, li ekfunkciis kiel prezidanto de Japana Esperanto-Instituto kaj ĉiam estis konsilanto de UEA.

S-ro Seiho Nishi estis ankaŭ fama anatomo kaj en multaj jaroj funkciis kiel rektoro de Gunma-universitato kaj redaktis la unuan japanan libron de anatomiaj bildoj pri la homo.

S-ro Seiho Nishi testamentis, ke li volas donaci sian tutan skeleton al la medicina fakultato de la nomata universitato por helpi la lernantojn en studado.

Foje kaj foje okazis donaco de koro kaj korneo post morto tamen malofte okazis donaco de tuta skeleto kiel specimeno. Tre laŭdinda estas tia oferemo.

Gunma-universitato ne disigos lian skeleton kaj tenos ĝin kiel kompletan specimenon por memoro.

Nova Rubriko

“Fotoj pri natura belaĵo”

De la jaro 1979 ni malfermos en nia gazeto novan rubrikon, en kiu ni aperigos fotojn pri natura belaĵo faritajn de ĉinaj aŭ eksterlandaj esperantistoj. Kun la foto (en grandeco proksimume de 6 coloj) oni bonvolu aldoni klarigon pri la foto. Ni ne resendas neuzitajn fotojn. Al sendintoj de ĉiuj uzitaj fotoj ni rekompencos per donacaĵo aŭ memoraĵo.

Ni atendas kunlaboron de fotamantoj tra la tuta mondo.

La Redakcio de EPC

La Tan-ŝafoj de Ninghia

LA Tan-ŝafoj, rigardate de malproksime, similas al la ordinaraj ŝafoj, sed rigardante ilin proksime oni povas rimarki ke ilia lano estas eksterordinare bela. La ĉina vorto "tan" signifas "bordon", kaj tiuj ŝafoj ricevis sian nomon pro tio, ke ili plej frue vivis ĉe la herbo- kaj akvoriĉaj bordoj de la Flava Rivero en Ninghia.

La Tan-ŝafo estas originala speco de ĉina ŝafo, kies felo povas esti preparita en bonan pelton. Ili vivas ĉefe en 14 gubernioj de la meza kaj norda partoj de la Ninghia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. La matura Tan-ŝafo havas fortikan korpon.

Tan-ŝafido ĵus naskita surhavas tutkorpe neĝblankajn kompaktnajn buklojn, ĉiu el kiuj konsistas el pli ol 1,000 laneroj longaj je pli ol tri centimetroj kun 4-8 kurboj. Tiuj bukloj estas

simetrie dislokitaj kaj malfacile malordigeblaj. La felo de tia nove naskita ŝafido estas bona materialo por fari peltan veston.

Kiam Tan-ŝafido havas unu-monatan aĝon, ĝiaj bukloj fariĝas plej belaj. Tiam ili longas je pli ol 8 centimetroj kaj havas po 8-9 kurbojn. La ŝafofelo kun tiaj bukloj estas mola, neĝblanka kaj glacea kaj plej taŭgas por fari peltan veston.

La felo de Tan-ŝafo havas ne nur belajn buklojn sed ankaŭ dezirindajn dikecon, molecon, fortikecon kaj elastecon. Ĝi estas tiel malpeza, ke la peltopecoj por unu surtuto pezas eĉ malpli ol du kilogramojn. Pro sia supereco, tia pelto havas bonan reputacion en- kaj ekster-lande kaj estas tre bone akceptata.

Sekve de kreskado de ŝafido, ĝiaj bukloj iom post iom malkompaktiĝas kaj la buklokurboj



Ŝafido

malaperas, tamen ne ŝanĝiĝas ĝiaj aliaj karakterizaĵoj. Tial lano de plenaĝa Tan-ŝafo estas bonkvalita materialo por fari lanan litkovrilon kaj tapiŝon.


La Tan-ŝafo estas subspecio de mongola ŝafo. Antaŭ pli ol 300 jaroj, mongolaj ŝafoj sur la sterila stepo okcidente de Helan-montaro translokiĝis al la okcidenta bordo de la Flava Rivero. Tie estas agrikultura regiono kun milda klimato, fekunda grundo kaj abunda herbaro de multaj specioj sur la bordo de la rivero. Pro tio tie ankaŭ estas bona loko por paŝtado. En ĉiu printempo, la paŝtistoj pelas la ŝafgregojn al la paŝtejoj, sur kiuj frue ĝermas la herboj pro la humida tero kaj varma vetero. Ĉar la ŝafoj povas frue sin nutri per verdaj herboj, ili povas relative frue refortiĝi post vintro. En somero kaj aŭtuno, kiam brulas la suno en la agrikultura regiono, la paŝtistoj pelas la ŝafgregojn al malvarmetaj valoj aŭ deklivoj de Helan-montaro por eviti la varmegon. Tie la ŝafoj povas ricevi freŝajn herbojn kaj klaran akvon. Post aŭtuna rikolto, la paŝtistoj denove pelas la ŝafarojn al la kamparo, por ke la ŝafoj manĝu tie postlasitajn spikojn kaj herbojn kaj sterku la kampojn per sia ekskremento. Kiam vintro alvenas, la ŝafoj estas repelitaj en montvalojn por ilin ŝirmi de frosta vento. Ĝuste tiel la paŝtistoj regule paŝtas kaj prizorgas la ŝafajn gregojn laŭ la na-

turaj kondiĉoj kaj vivbezonoj, kaj elkulturis la fame konatan bonan specion Tan-ŝafo post multjara selektado kaj kulturado.

Por disvastigi Tan-ŝafarojn, la Ninghia-a Hujnacieca Aŭtonoma Regiono konstruis, en 1959, selektejon de Tan-ŝafoj. En la lastaj 20 jaroj, sub la gvido kaj helpo de la scienca institucio de la aŭtonoma regiono, laboristoj kaj teknikistoj de la selektejo plibonigis la specion per diversaj metodoj. Precipe post la frakaso de la "kvarpersona bando" ili kuraĝe aplikis "familian" metodon de selektado kaj per tio multe altigis la kvaliton de Tan-ŝafoj.

La disvolviĝo de la laboro de la Tan-ŝafa selektejo kaj la altigo de la kvalito de Tan-ŝafoj ankaŭ vekis intereson de la kamparaj komunumoj kaj brigadoj pri bredado de Tan-ŝafoj. En ĉiu somero kaj aŭtuno, ne nur la koncernaj gubernioj de la aŭtonoma regiono sendas homojn al la selektejo por lerni teknikon de selektado, sed ankaŭ la Interna Mongolio, Ŝenhi, Ŝanhi, Gansu kaj aliaj provincoj kaj regionoj alsendas homojn al ĝi por lerni teknikon kaj aĉeti bonspeciajn ŝafojn. En la pasintaj pli ol dek jaroj, la selektejo liveris ĉ. 10,000 virŝafojn al aliaj lokoj kaj funkciigis multfoje teknikajn kursojn por helpi kamparajn komunumojn kaj brigadojn en disvolvado de Tan-ŝafa bredado. Nun, la tuta regiono jam bredas pli ol 1,000,000 Tan-ŝafojn.

Paŝtado



Semoŝafo



En ĉirkaŭaĵo de la antikva Jangguan-pasejo


NIA aŭto ekveturis de Dunhuang de Gansu-provinco sudorienten, forlasis la oazon de Dunhuang kaj eniris Gobi-dezerton. En tiu zono oriente de la vasta dezerto Taklimakan kaj okcidente de la vasta dezerto ĉe la fino de Kilian-montĉeno estas fame konata ventblovejo. Kurrante sur tiea ŝoseo, nia aŭto estis envolvita de furioza flava sablovento.

Ni veturis ĉ. 70 kilometrojn kaj venis en verdejon, kie mildiĝis la vento kaj vidiĝis mirinda pejzaĝo: Interkruciĝas poplaj forstozonoj; inter la arbovicoj estas tritikaj kampoj, la pezaj oraj spikoj antaŭdiris riĉan rikolton; en la verdaj

ombroj elrigardis pure blankaj domoj... Tie troviĝas la Popola Komunumo de Nanhu, tiu loko estis la antikva Jangguan-pasejo. Ni faris tre interesan viziton al la komunumo. Unu el ĝiaj respondeculoj havigis al ni multajn informojn pri ĝi kaj la historio de tiu fama regiono.


La antikva Jangguan-pasejo estis grava fortikajo sur la Silka Vojo kondukanta al la okcidentaj regionoj. Sed pro atakado de terura sablovento dum centoj kaj centoj da jaroj, tiu loko jam tute dezertiĝis, kaj la trafikoplana vojo tra Jangguan-pasejo en la antikveco jam estis kovrita de sablo. Antaŭ la Liberiĝo, mal-

Huangŝujba-akvokonservejo





La tri filinoj de Du Jaŭhua



Amatora ĉarpentisto Du Jaŭhua

multaj laboruloj fuĝis tien por eviti perfortan rekrutadon fare de Kuomintango kaj vivtenis sin per kulturado de virga tero. En tiu tempo, lupoj ofte atakis la loĝantojn kaj sablovento englutadis elkulturitajn kampojn.

Post la Liberiĝo, tieaj kamparanoj sin organizis en interhelpajn grupojn kaj kooperativojn kaj poste en popolan komunumon. La komunumanoj forstumis la teron kaj per tio bridis la sabloventon, kaj krome ili fondis forstokulturejon ĉe la rando de la dezerto Taklimakan. La komunumanoj de pli ol 40 familioj penege laboris kun ŝtala obstineco sub la gvido de la partia komitato de la komunumo, ebenigis pli ol 3,000 sablo-montetojn kaj plantis pli ol 4,000,000 arbidojn en areo de pli ol 5,000 muoj (15 muoj = 1 hektaro). Ili ankaŭ alportis humon de loko pli ol dek liojn (1 lio = 0.5 km.) fora, konstruis pli ol 400 muojn da kampoj sur tereno kun sablo kaj ŝtonetoj kaj kulturis grenplantojn sur ili. La forstokulturejo ankaŭ entreprenis kulturadon de grenplantoj. Nun ĉiuj la 5 brigadoj de la komunumo starigis forstokulturejon kaj iliaj 17 produktaj taĉmentoj jam havas sian propran fruktoĝardenon kaj ĉiu komunumano posedas meznombre 1,500 diversajn arbojn. La forstozonoj de poploj kaj salikoj enbridigis la flavajn drakojn de sablovento kaj efike protektas la kampojn kaj domojn.

Por verdigi dezerton necesas akvo, ĉar sen akvo nenia vegetaĵo povas kreski. Ĉe Nanhu

troviĝas riĉa akvofonto subtera, tamen antaŭe oni ne utiligis ĝin kaj la akvo vane perdiĝis en la dezerto. La energia akvoutiliga konstruado de la popolo de Nanhu komenciĝis de la akvobaraĵo Huangŝujba. Sude de Huangŝujba-akvokonservejo estas vasta herbejo, kie generadas bonrasaj ĉevaloj de antikveco. En historia verko oni skribis, ke dum la regado de Imperiestro Vudi (140-87 a.K.) de Han-dinastio, iu Baŭ Liĉang kulturis kun armea trupo kampojn en Dunhuang kaj bredis ĉevalojn apud Vuva-lago. Li ofte vidis sovaĝĉevalojn venantajn al la lago por trinki, kaj foje eltrovis tre elitajn inter ili. Li do faris el argilo homfiguron kun brido en la mano, surmetis vestojn al ĝi kaj ĝin starigis ĉe la akvo. Iom post iom la sovaĝĉevaloj alkutimiĝis al la statuo, kaj tiam Baŭ Liĉang anstataŭis la figuron kaj kaptis la ĉevalon per ŝnuro. Li prezentis la kaptajon al la imperiestro, kaj la lasta tre ĝojiĝis pro la valora besto kaj verkis la poemon «Kanto pri la Ĉiela Ĉevalo». Kaj la nomita Vuva-lago estas nenio alia ol la hodiaŭa Huangŝujba. Nun post aldono de baraĵo multe pligrandiĝis la kapacito de la lago. Starante sur la baraĵo ni rigardis al la lago kaj vidis, ke akvobirdoj flugas super la ondetanta akvosurfaco kaj fluo torentas norden en irigacian kanalon por akvumi 300 hektarojn da kampoj. En la lago centoj da miloj da fiŝidoj estas bredataj. Sude de la lago estis paŝtejo en antikveco kaj nun tie paŝtiĝas brutaro de la komunumo. En la tereno de Nanhu-komunumo, ĉie vidiĝas murmuraj iri-

gaciaj kanaloj kaj verdaj arboj, kiuj impresas kiel sudĉinia pejzaĝo.

Ni promene iris al loĝpunkto de la popola komunumo. Ambaŭflanke de la vojo staris vicoj de poploj, inter kiuj vidiĝis blankaj domoj. Ni rimarkis pardon duone fermitan apud la vojo, malfermis ĝin kaj eniris. Iu avo estis ĉarpentanta en la korto. Rimarkante la envenantajn gastojn, li tuj iris renkonte al ni kun rideto kaj petis nin iom sidi en lia domo. La avino tuj prezentis al ni teon. Ni komencis interparoli kun la mastro kaj dume jetis rigardon al la korto. Tion rimarkis la mastro kaj divenis nian deziron. Li do invitis nin iom pririgardi la korton. La korto havas areon de ĉ. 50 kvadrataj metroj. Ĉe la norda kaj suda flankoj de ĝi troviĝas po unu kvarĉambra domo kun totala plankareo de 160 kvadrataj metroj. En la korto troviĝas puto kun manpumpilo. Super la korto estas sunŝirma laŭbo el branĉoj por protekti la loĝantojn de la arda sunbrilo en somero de la Koridoro Okcidente de la Flava Rivero, kies temperaturo povas atingi 40°C. Post la korto troviĝas ĝardeno kun areo de ĉ. 1 muo, kie oni kulturis fazeolojn, melongenojn, brasikojn, sunflorojn, kukurbojn, botelkukurbojn, tubajlojn, paprikojn kaj aliajn legomojn. Krome du porkoj kaj kvar ŝafoj brediĝis tie. Apud la domoj kreskis fruktoplenaj abrikotarboj.

La mastro nomiĝas Du Jaŭhua, 66-jara. Antaŭ multaj jaroj, li fuĝis de Siĉuan-provinco al tiu ĉi loko por eviti perfortan rekrutigon fare de

Kuomintango kaj vivtenis sin per kulturado de virga tero. Post la Liberiĝo, li laboris en grenvendejo de la komunumo kaj nun jam emeritiĝis kun monata pensio de 47 juanoj. Li ŝatas ĉarpentadon. Li havas 2 filojn kaj 3 filinojn. La plejaĝa filo nun laboras kiel taĉmentestro en la asbesta minejo de la komunumo post abiturientiĝo, la dua filo fariĝis traktoristo post diplomitiĝo el supera mezlernejo kaj la plejaĝa filino, kiu ĵus abiturientiĝis, sin preparas por daŭrigi sian studon en universitato. Liaj du plej junaj filinoj nun studas en mezlernejo. Krom lia pensio, lia familio povas enspezi en ĉiu jaro pli ol 800 juanojn, post pago de la kostoj de la konsumitaj greno kaj legomoj. Montrante al nove konstruita domo, Du Jaŭhua diris, ke ĝi estas por la plejaĝa filo baldaŭ edziĝonta. La ĉambro estis ekipita per nova meblaro. Ni demandis la mastron: “Kiu svatis por via filo?” Li ekridis kaj diris al ni: “Svatisto tute ne necesas! La geamantoj kune laboradis kaj kunvenadis kaj interkonatiĝis per si mem! Tio estas libera interamo!”

Kiam ni stariĝis por adiaŭi, la mastrino alportis al ni bovlojn da vaporantaj vermiĉeloj kaj nepre deziris, ke ni gustumu. Kaj ilia filineto Du Fengping alportis korbon plenan de abrikotoj kaj klopodis meti la fruktojn en niajn poŝojn. Tiam mi ekmemoris la verson de la fama poeto Vang Vej de Tang-dinastio “Neniu konato sin trovas trans Janguan-pasejo”, kiu prezentas dezertecan bildon, akre kontrastan al la nuna bela ĉirkaŭaĵo de tiu historia loko.



Aleo de la Popola Komunumo de Nanhua



En la Somera Palaco

Foto de Van Gjun

Notoj pri somerferia kampado

EN aŭgusto de 1978, okazis en nia lando somerferia kampado de knaboj por aviada aktivado. La kampejo estis en la Pekina Aero-naŭtika Instituto. Pli ol 300 geknaboj venis de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj inkluzive de Tajvan-provinco de nia lando. Mi, kiel ĵurnalisto, havis ŝancon partopreni en ilia vicaro, kaj same kiel la geknaboj, mi skribis taglibron kaj kaptis iliajn ridantajn mienojn per fotilo. Ĉi sube mi aperigas kelkajn paĝojn el mia taglibro kiuj spegulas la vivon de la somerferia kampado.

La 6-a de aŭgusto **Serena**


Vespere, en la klubejo de la instituto brilas lampoj. En ĝi okazas

amuza vespero por bonvenigi la geknabojn el la tuta lando, kiuj partoprenas en la aktivado de la somerferia kampado. Refoje malfermiĝis la kurteno kaj la knabino en brilkolora kostumo reaperis sur la scenejo kaj anoncis:

“La sekvanta programero estas horajo de maljunaj profesoroj. El ili, la plej juna estas 45-jara, la plej aĝa pli ol 70-jara, kaj ilia meznombro aĝo estas 58-jara.” Apenaŭ finiĝis la vortoj de la anoncistino, kiam aŭdiĝis varma manplaŭdo en la halo. Tiam dekkelkaj profesoroj kaj vicprofesoroj ascendis la scenejon. Kvankam ili estas grizharaj aŭ blankharaj, tamen ili aspektis viveplenaĵ. Inter ili, iuj estas kantistoj

de la tri-dekaj jaroj kaj aliaj amatoraj aktoroj de la kvardekaj jaroj. Sed ili tiel emociiĝis, kvazaŭ ili unuafoje surirus scenejon. La tri kantoj prezentitaj de ili estis malnovaj kaj ilia arto estis ne super la ordinara nivelo, tamen tre longe daŭris manklakado en la halo.

La ĉeestantoj komprenis, ke tiuj maljunaj profesoroj ne nur prezentis programerojn, sed ankaŭ elverŝis sian koran bondeziron al la geknaboj aviad-amantaj. Por disvolvi la aviadon de Ĉinio, la profesoroj diligente laboris dekojn da jaroj. En la pasinteco, ili ĝoje vidis ke aroj post aroj da viglaj junuloj surirus la aviadan fronton kaj ke la aviada afero de nia lando ĝermis, kreskis



Ekzercado de paraŝutado

*Flugu, hirundoj de arĝento,
al la vastega universo,
al la senlima spacetendo. . .*

La 11-a de aŭgusto Serena

Frumatene, la geknaboj vekigis en la sonado de klariono. Denove estas serena ĉielo, eĉ neniu nubeto troviĝas en la lazura firmamento. Hodiaŭ, la geknaboj veturis per pasaĝera aviadilo super la ĉefurbo Pekino. Post la prezentado de la aviadisto, mi ascendis la grandan aviadilon. "Ekfunkcias la motoroj!" "Ekflugas la aviadilo!" ĝoje kriis la geknaboj. Aŭdinte komentojn kaj laŭdojn de geknaboj, ankaŭ mi ŝovis mian kapon al luko kaj rigardis malsupren. Fabrikoj, vilaĝoj kaj lagoj rapidege preterflugis. La belajoj de la patrolando vekis revojn ĉe la geknaboj. Tuj post kiam ili descendis el la aviadilo, ili ĉirkaŭis la piloton kaj faris diversajn demandojn al li, kun avido al scioj pri aviado. Tuj geknaboj staradis ĉirkaŭ la aviadilo kaj longe ne volis foriri.


En ekzerco de paraŝutado

Foto de Ding Songfu

kaj maturiĝis: ili ankaŭ propraokule vidis ke la "kvarpersona bando" tretis la aferon kaj metis ĝin en situacion sen daŭrigantoj. Hodiaŭ, vidante, ke pli ol 300 elitaj geknaboj venis al la instituto por lerni sciojn pri aeronautiko kun forta deziro konstrui la patrolandon kaj defendi ĝian bluan ĉielon, kiel la maljunaj profesoroj povis ne kurtuŝiĝi kaj sin deteni de esprimo de ilia bondeziro al ili!

La geknaboj laŭte aŭdigis la "Kanton de Somerferia Kampado", por esprimi sian memfidon en grimado de scienca altaĵo.

*Flugu, hirundoj de arĝento,
flugu, hirundoj de arĝento,
la kampadejo nia estas en la
vasta firmamento.*



Reveninte al la kampadejo mi tre volis scii, kion la geknaboj pensis kaj preparolis. Kiam mi eniris la dormoĉambron de la grupanoj el Henan-provinco, la geknaboj jam kvietigis. Iuj el ili skribis leteron al siaj instruistoj, kunlernantoj aŭ gepatroj kaj aliaj skribis taglibron. Ricevinte permeson de Sen Lej, lernanto de la 9-a Mezlernejo de Ĝengĝoŭ, mi prenis lian taglibron kaj legis en ĝi jenajn vortojn: "En la pasinteco mi ŝatis ludi aviadilan modelon, nur pro ludemo kaj deziro superi aliajn en konkurso. Hodiaŭ, veturinte per aviadilo kaj vidinte ke ĝi estas farita eksterlande, mi sentas pli pezan taskon sur mi. Mi diligente lernos la bazajn sciojn kaj decidis min ĵeti en la aviadan aferon en la estonteco por elfari niajn aviadilojn!" Liaj vortoj kaj idealo profunde kortuŝis min. Jes, mi kredas, ke en la estonteco, mi povos vidi pasaĝerajn aviadilojn faritajn de nia lando flugi en la blua ĉielo. Eble iuj el tiuj geknaboj, kiuj partoprenas en la aktivado de la somerferia

kampado, troviĝos inter la fabrikantoj de tiaj aviadiloj.

La 17-a de aŭgusto Nuboza


En kelkaj tagoj dum la kampado, la geknaboj sin okupis per farado de modelaj aviadiloj, provflugado de ili kaj spektado de demonstrado de la grupo de modelaj aviadiloj de la Pekina Aeronautika Instituto. Post kiam la instruisto klarigis al la geknaboj la atentindajn aferojn en la farado, la lastaj tuj ekagis. Ili zorge rigardis la desegnaĵojn, prilaboris laŭ ili la kolorajn plastajn tabulojn, ilin kungluis. . . Mi rimarkis, ke iu altstatura kaj forta mezaĝulo ofte klarigis al la grupanoj, svingante sian manon. Li estas Sun Gingkiaŭ, majstra sportisto de aviadilaj modeloj. En 1960, li rompis mondan rekordon de aviadilmodela sporto. Ĉifoje, li alvenis labori kiel instruisto de aviadilmodela aktivado. En la komenco, li konsideris ke en multaj lokoj jam ĉesis aviadilmodela aktivado, do ĉifoje oni povas fari nur plej simplajn mani-

pulojn. Pro tio li, kune kun aliaj kamaradoj de la aviadilmodela grupo, faris nur kelkajn aviadilajn modelojn per malgranda tirforto kaj dek manipolatajn per fadenoj. Poste Sun Gingkiaŭ dufoje ŝanĝis sian planon, informiginte ke multaj el la grupanoj faris kompleksajn aviadilajn modelojn kaj atingis bonan rezulton en konkurso. Li pensis en si, ke por tiuj ĉi geknaboj necesas resumado kaj interŝanĝo de sperto kaj altigo de tekniko kaj por la aliaj vastigo de iliaj scioj. Sekve, li denove ŝanĝis sian planon kaj aldonis novajn specojn de aviadilaj modeloj. La plurfoja ŝanĝo de la plano montris la deziron de la sportistoj, ke la geknaboj rapide kresku kiel daŭrigantoj de la aviada afero.


La 18-a de aŭgusto Serena

Sur la sportejo de la Pekina Aeronautika Instituto, pli ol 300 geknaboj kune kun miloj da profesoroj kaj lernantoj de la instituto spektis la ludadon de aviadilaj modeloj. La arĝentaj aviadiloj propraj

Telestirado



Veturo per pasaĝera aviadilo Foto de Van Gjun



mane faritaj de la geknaboj ekflugis al la ĉielo. Inter ili troviĝis du aviadiloj triaklasaj, kiuj streĉe batalis en ĉielo. Subite, ektumultis la amasoj, jen aviadila modelo manipulata de grupano flugis en la ĉielon, ĝi altiris la atenton de spektantoj pro sia lerta kaj ekvilibra flugado. Kaj ĝi estas diferenca de la aliaj aviadiloj, ĉar ĝi havas strangan flugilon.

Tiu modelo estas farita de Vang Ĝengĝoŭ, lernanto de la deka klaso de la 88-a Mezlernejo de Ŝenjang, kun liaj kunlernantoj. La 18-jara Vang Ĝengĝoŭ estas fervorulo de sciencaj aktivadoj kaj membro de la grupo de aviadilaj modeloj de la urbo. Helpate de siaj instruistoj, li faris kune kun aliaj grupanoj, diversajn aviadilajn modelojn. En junio de 1977, li faris kun siaj kunlernantoj novtipan aviadilan modelon stiratan per radiaparato de multaj kanaloj. Post sukcesa provflugado, ĝi estis plene ŝarĝita per insekticido kaj komencis sian laboron super malgranda areo de arbaro. Tio ricevis aplaŭdon de popolamasoj

de tiu loko, li kaj liaj kunlernantoj gajnis premion en la Tutlanda Scienca Konferenco.

La 22-a de aŭgusto **Serena**

Noktiĝis. Steloj briletis en la ĉielo. En la kampadejo oni okazigis la plej ŝatatan aktivadon — vesperkunvenon de bivakfajro.

Vang Ĝaŭhua, gvidanto de la Ĉina Komunisma Junulara Ligo ekbruligis torĉon kaj transdonis ĝin al geknaboj, kaj ĉi tiuj ekbruligis tri bivakfajrojn. Tuj aŭdiĝis tamburado, klaronado kaj senĉesa manklakado. Tio simbolis ke la geknaboj alte tenos la torĉon transdonitan de la maljunaj revolucistoj kaj sciencistoj kaj diligente grimpados la altaĵon de scienco.

La bivakfajroj flamadis. En la kapo de la geknaboj reaperis la memorindaj momentoj de la 15-taga vivo en la somerferia kampadejo. Sun Benhua, unu el niaj plej fruaj aviadistinoj kaj viceskadrestro de la aera armeo, funkcias kiel estrino de la kampadejo. Por ke la geknaboj vivu gaje kaj lernu opor-

tune, la trupo alsendis al ili dek aŭtobusojn, la ĉefurba arohaveno alsendis elstarajn pilotojn, la Sepa Maŝinfabrika Ministerio donacis al ili modelon de sputniko, artaj grupoj prezentis programerojn por la geknaboj kaj la Pekina Aeronautika Instituto asignis 12 elstarajn junajn instruistojn por ilin gvidi.

En akompano de akordionoj, la geknaboj kantis dancante apud la bivakfajroj:

*Ni havas ja aspiron de la
bravaj agloj*

*kaj volon lukti kontraŭ
ŝtorm-provoko.*

*Al ni havigis la Partio ideal-
flugilojn,*

*ni ekveturos en la kosmoŝipo
de l' epoko.*

*Firme ni sekvados Prezidan-
ton Hua en la bataloj*

*de l' nova Longa Marŝo tra
obstinaj baroj.*


La kanto de la geknaboj ĉiam sonadas en miaj oreloj.



Fari aviadilan modelon

Foto de Huang Ĝenlian

Modela ĉefinstruisto Liu Ĉunpu



Liu Ĉunpu

Foto de Sima Hiaŭmeng

EN 1968, post diplomiĝo el la Pekina Normala Instituto, 23-jara Liu Ĉunpu fariĝis matematika instruisto de la Unua Mezlernejo en Tonghian-gubernio. Li estis ĉefinstruisto de 5 sinsekvaj grupoj. Sub lia edukado tiuj grupoj ĉiuj ŝanĝiĝis en elstarajn kolektivojn en studo, unuigo kaj konduto. En julio, la Eduka Ministerio kaj la Pekina Revolucia Komitato titolis lin per la nomo de modela ĉefinstruisto.

Liu Ĉunpu ĉiam havas fervoron por siaj lernantoj kaj volas elkulturi ilin en talentulojn por la socialisma konstruado. Li pacience helpis lernantojn starigi la penson lerni por revolucio kaj bonan kutimon de lernado.

En printempo de la pasinta jaro, instruisto Liu estis asignita kiel ĉefinstruisto de la 12-a grupo de la dua klaso de la lernejo. Tiu grupo havas 48 geknabojn kun aĝo de 12-13 jaroj. Pro la influo de multaj absurdaj tezoj de la “kvarpersona bando” celantaj detru la edukan aferon, la kvalito de ĝia lernado estis tre mizera. 60 procentoj de la lernantoj de la grupo ne sukcesis trapasi matematikan ekzamenon.

Li pensis en si, ke unue oni devas altigi memvolecon de la lernantoj en lernado. Do li venigis ilin al si kaj demandis: “Pri kiu laboro vi volas okupiĝi en estonteco kaj kia estas via idealo?”

Tuj ekbolis la klasĉambro. La naivaj geknaboj konkure ekparolis. Iu diris, ke li fabrikos kosmoŝipon por vojaĝi tra la kosmo, alia diris ke li volas malkaŝi la sekreton de planedoj kaj tria volas solvi malfacilan problemon de matematiko. . .

“Kiel vi efektivigos tion?” la instruisto serioze demandis. “Ĉu vi povus manipuli la komplikajn ekipaĵojn de kosmoŝipo? Ĉu vi povus munti dek-milojn da elektronaj pecoj? Ĉu vi povus ĝuste kalkuli diversajn nombrojn? Kaj kio rezultos, dum kalkulado, se vi mislokos decimalan punkton?”

Tiam la geknaboj ekdiskutas arde, nur kelkaj petolaj knaboj silentas kaj falis en mediton pri la problemoj neatentataj en la pasinteco.

Post diskutado, la lernantoj venis al sama opinio, ke ili devas lerni diligente por efektivigi

sian idealon kaj posedi sciencajn kaj kulturajn sciojn por efektivi modernigon de sia lando. Tiutempe aperis kontenta rideto sur la vizaĝo de instruisto Liu.

Poste, la instruisto unuflanke donis al la geknaboj novan lecionon de matematiko kaj aliflanke helpis ilin en restudo de la lernita leciono. Kaj en tio li aplikis 3 malsamajn metodojn al la lernantoj laŭ ilia malsama stato. Post duonjaro, la tuta grupo akiris bonan rezulton de 80 poentoj meznombro en matematika ekzameno. Nun triono el la lernantoj komencis memlerni matematikan lecionon de supera mezlernejo.

Lernanto Ĉen Giangong havis multajn malfacilojn en lernado pro tio, ke li iam estis vundita je cerbo pro elektrofrapo, kaj en ekzameno de matematiko li gajnis malpli ol 50 poentojn. La instruisto rakontis al li pri la diligenta lernado de Ĉefministro Ĝou Enlaj, kiu lernis eĉ rajdante sur ĉevalo malgraŭ la febro de ĉ. 40 gradoj dum la Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo en la jaroj 1934-1935. Li kuraĝigis lin venki malfacilojn en lernado. De tiam Ĉen Giangong diligente lernis kun obstina spirito kaj samtempe instruisto Liu ofte donis al li apartan helpon. Dank' al tio Ĉen Giangong rimarkinde progresis en lernado. En la semestromeza ekzameno de ĉijara unua

duono, liaj 6 lecionoj superis meznombro 82 poentojn.

Liu Ĉunpu estas kreiva en instruado. Li klasifikis la donitajn sciojn post certa tempo kaj disvolvis diversajn konkursojn por altigi memvolecon de la geknaboj en lernado, kiaj tiuj pri fundamentaj scioj, tabelokonsulto kaj kalkulado. Li povas turni la ekzamenon, iom timindan aferon por lernantoj, en interesajon. Li lasis ĉiun lernanton elmeti ekzamenajn problemojn kun la kondiĉo, ke la problemoj devas speguli la ĉefan enhavon de la leciono en certa periodo kaj cetere ili mem faru ĝustan solvon de siaj problemoj kaj kriterion de poentodono. Por tion fari la geknaboj devis serioze kaj sisteme restudi la lernitajn lecionojn kaj tiel la celo de ekzameno estis atingita.

Liu Ĉunpu faris multajn kontribuojn por la eduka afero.

Post sia lecionhoro, li ofte interparolis kun geknaboj pri iliaj pensoj kaj la lernita leciono. Vespere, li ofte vizitas familiojn de lernantoj, kaj ankaŭ la geknaboj ofte interparolas kun li pri diversaj demandoj. Dank' al tio li konas tre bone pri la pensoj, lernado, karakterizaĵoj kaj interesoj de la 48 lernantoj.



Liu Ĉunpu (la kvara de dekstre) kaj geknaboj

Kiel multe klopodis la instruisto por eduki posteulojn!

En la komenco de 1977, 13-jara Vang Lujan venis de alia lernejo al la dua klaso de la Unua Mezlernejo de Tonghian-gubernio. Pro agitado de la "kvarpersona bando", li erare opiniis ke aflikti instruiston ja estas heroaĵo "kontraŭ la fluon", tial li ĉiamaniere petoladis kun instruisto dum leciona horo. Multaj instruistoj, eĉ liaj gepatroj malesperis pri li.

Sed Liu Ĉunpu alprenis alian sintenon al li. Li fojrefoje kontaktiĝis kun Vang Lujan, kaj admonis liajn gepatrojn kaj aliajn kunlernantojn multe prizorgi kaj helpi lin. La instruisto interparolis kun li kaj vizitis lian familion dekojn da fojoj. En la interparoloj kun li instruisto Liu montris liajn malbonajn pensojn kaj kondutojn formiĝintajn pro la venena propagando de la "kvarpersona bando", kaj atentigis lin firme memori la mizeran vivon de liaj avo kaj patro subpremataj de bienuloj en la malnova socio, lerni bone kaj korekti sian eraron por revolucio. Samtempe kun tio, instruisto Liu helpis lin restudi la lernitajn lecionojn.

En kunestado kun Vang Lujan instruisto Liu trovis, ke li estas cerbumema knabo kun forta kompreno kaj bona memoro. Matematikajn problemojn, kiujn ordinaraj lernantoj povas solvi en 90 minutoj, li povas en 30 minutoj. Poste instruisto Liu donis al li lecionojn de matematiko de supera mezlernejo, prezentis multajn rimedojn por solvo de matematikaj problemoj kaj admonis lin lerni la diligentecon de la revolucia instruisto Marks kaj la spiriton de diligenta studado de la fame konata matematikisto Hua Luogeng kaj Ĉen Gingjun, por altigi lian volontecon en lernado. En malpli ol duonjaro li ellernis la matematikajn lecionojn entute kaj tiujn de fiziko kaj kemio parte de supera mezlernejo. Lujan ne nur mem diligente lernas, sed ankaŭ helpas aliajn postiĝintajn kunlernantojn. En la fino de la pasinta jaro li estis titolita kiel lernanto kun bona penso, bona lernado kaj bona sano. En majo de la kuranta jaro li gajnis la unuan lokon en la matematika konkurso de la tuta gubernio. Poste li gajnis la 15-an lokon en la matematika konkurso de ok provincoj kaj urboj, en kiu partoprenis 200,000 lernantoj, kaj honore ricevis duagradan premion.

De kie estas la mono?

EN aŭgusto de 1977, elmigrinta ĉino Sinjoro Gaŭ Jiping revenis al sia hejmloko en Fuking-gubernio de Fugian-provinco, por viziti siajn parencojn. Tie li trafis emocian aferon.

Ĝi tiel okazis. Antaŭ nelonge, al la hejmo de Gaŭ Jiping venis gastino. Ŝi nomiĝis Vang Jujing, oficistino de la Ĉengguan-a Oficejo de la Popola Banko de la gubernio Fuking. Enirinte, ŝi diris, ke ŝi venas por sendi monon. Gaŭ Jiping demandis kun miro: "De kie estas la mono? Ja neniu sendis monon al mi, post kiam mi revenis al la patrolando." Vang Jujing klarigis ridetante: "Ne temas pri poŝtmandato, sed la interezo por monsumo deponita de via familio antaŭ kvin jaroj. Kiam la deponita mono estis reprenita en 1976, oni ne pagis sufiĉe da interezo

por ĝi pro miskalkulo, kaj nun post denova kontrolo, ni trovis, ke ni devas pagi al vi ankoraŭ 23.73 juanojn. Jen ili estas!" Aŭdinte ŝian klarigon, Gaŭ Jiping sentis la aferon stranga: Kiel miskalkulo de interezo povas esti eltrovita post kelkaj jaroj kaj kiel oni povas sendi la pagendan sumon al la deponintoj? Vang Jujing faris pluan eksplikadon. En la pasintaj kelkaj jaroj, iuj reguloj de tiu gubernia banko estis malobservataj, la kontistoj kaj la kasistoj ne faris krucan ekzamenadon, tial eraroj okazis. En la fino de 1977, por efektiviĝi la decidon de la Tutlanda Financo-ordiga Konferenco, la Popola Banko de la gubernio Fuking elektis la Ĉengguan-an Oficejon kiel provo-punkton de ordigado de posedaĵoj, kapitalo kaj kontoj. La banko ekspedis

Goldbach-konjekto

(raportaĵo)

(Daŭrigo)

VII

Ankaŭ la formuloj de matematiko estas unu el la mondaj lingvoj. Scipovantoj de tiu lingvo komprenas ĝin, kiun penetras la plej strikta logiko kaj natura dialektiko. Ĝi povas klarigi la sekretojn de la suna sistemo, la sistemo de Laktovojo, la ekstergalaksio kaj la universo, kaj la misterojn de la atomo, elektrono, partiklo kaj straton. Tamen nur malmultaj povas sin levi en tiun altan matematikan regnon.

Profesoro Min Sihe tamen povas ĝin gustumi kaj apreci kaj observi ĝian superbecon. Li diris tiam: “Tre bone laboras Ĉen Gingjun lastatempe. Li jam finis la tezon pri Goldbach-konjekto. Mi jam legis ĝin, tre bone li skribis.”

“Ĉu jam finiĝis via tezo?” iu armeano-representanto (ĈPLA-a kadro alsendita en la kultura revolucio) demandis al Ĉen Gingjun, “kial vi ne prezentas ĝin?” Ĉen Gingjun respondis: “Mi faras sed ne finis ĝin.” Tiu diris: “Mi esperas ke vi frue finos la laboron.”

La respondeculo de la sekcio Maljuna Tian diris al Sekretario Li: “Vi povas iom instigi lin prezenti la tezon, sed ne urĝigi. Se li ne volas nun prezenti, do li havas sian kaŭzon.”

Ĉen Gingjun diris: “Mi ankoraŭ faras sed ne finis.”

“Mi vere ne finis. La tezo estas finita kaj tamen nefinita. De post kiam mi venis al la Matematika Instituto, mi plenenergie min decidiĝis al la studado, dank’ al la kulturo kaj edukado de severaj instruistoj, famaj specialistoj kaj nia organizaĵo. Kion alian mi povus fari? Se ne tiel fari mi vanigus la esperon de la Partio. Inter la pli ol 30 malfacilaj problemoj en la teorio pri nombroj de la monda matematiko, mi solvis ses aŭ sep kaj per tio akcelis la solvon de la tuta aro. Tio estas nemankigeblaj hardado kaj preparo por mi. Kaj sekve de tio mi povas marŝi al Goldbach-konjekto. Pro tio mi jam elĉerpis mian tutan energion.

“En la jaro 1965, mi unuapaŝe atingis $(1+2)$. Sed mia solvo estis tro kompleksa kaj mi devis skribi pri ĝi pli ol 200 paĝojn. Al matematika tezo oni postulas unue ĝustecon, due lakonecon. Tio similas al la irado de interne de la urbo Pekino al la Somera Palaco. Oni devas elekti la plej ĝustan, plej mallongan kaj plej bonan el la multaj vojoj. Mia longa tezo estas senerara tamen tro longa. Mi ne publikigis ĝin, kaj de tiam pasis jam sep jaroj.

“La afero estas iom malfacila kaj malfacile komprenebla por aliaj. Mi prenu la lernon de fremdaj lingvoj kiel ekzemplon. Mi lernis la anglan en la mezlernejo kaj la rusan en la uni-

al ĝi ordigan grupon, kiu faris ĉiuf flankan kontroladon al la kontoj kaj kartoĵoj de pli ol ok mil deponantoj de la pasintaj kelkaj jaroj, kaj trovis, ke parto de la interezoj estis mispagitaj. La ordiga grupo multe klopodis kaj trovis la adre-

sojn de la deponintoj kaj sendis al ili la pagendan monon.

Aŭskultante ŝin Gaŭ Jiping foje kaj refoje kapjesis kaj laŭdis, ke vere bona estas la Popola Banko de la patrolando.

versitato, kaj mem lernis la germanan kaj francan en la instituto kaj povas iom legi kaj skribi en tiuj lingvoj. Poste mi mem lernis la japanan, la italan kaj la hispanan kaj nun povas iom legi fremdlandajn materialojn kaj literaturon. Dank' al tio, kiam mi volas lerni de spertoj kaj sukcesoj de fremdaj landoj, mi povas studi ilin rekte en la originalo kaj ne devas atendi alies tradukadon. Tio estas nemankigebla kondiĉo. Mi devas tralegi kiom eble la tuton de fremdlandaj materialoj, digesti kiom eble ĉiujn fruktojn de saĝo de la antaŭuloj. Nur poste mi povas solvi la problemon (1+2) sur tiu bazo.

“Mia frukto devas esti esprimita en tia tezo, kvankam faka tamen relative simpla, kvankam relative strikta tamen ankaŭ nepre absolute strikta. Kelkaj lokoj jam apartenas al filozofia kampo. Tial mi cerbumis kaj cerbumis, kalkulis kaj kalkulis, kontrolis kaj kontrolis, reviziis kaj reviziis senfine. Mi eĉ ne memoras kiom da fojoj mi reviziis. Scienca sinteno devas esti plej severa.

“Mi scias ke mia malsano jam delonge serioziĝas preskaŭ ĝis nekurableco. Bakterioj mordas miajn internaĵojn. Mia korforto jam elĉerpiĝis kaj mia korpo vere ne povas plu sin teni. Nur miaj cerbaj ĉeloj estas eksterordinare viglaj, tial mia laboro ne povas halti kaj mi ne devas halti. . .”

VIII

En februaro de 1973, venis la Printempa Festo.

Je unu tago antaŭ ĝi, Fratino Ĝoŭ de la Matematika Instituto diris, ke en festotagoj oni devas aparte zorgi pri la malsanuloj. Ŝi diris: “Ni neniel devas forlasi la laborstilon de la malnovaj oka-voĵaj armeanoj, formitan antaŭe en la trupo. Precipe tiujn kamaradojn kia Ĉen Gingjun ni devas multe zorgi. Li estas tiel obstina, ke la malsano devigas lin kuŝi en lito, tamen li neniam restis en lito. Malgraŭ ĉio, li ĉiam barakte sin ellitigas por persisti en sia laboro. Por kio kaj por kiu li tiel laboregas? Ĉu por si mem? Se por tio li jam delonge forlasus la laboron. Ne, li laboras por la popolo, por la Partio. Ni devas konsoli lin kaj ankaŭ la aliajn malsanulojn de la instituto.”

Matene de la festotago, Fratino Ĝoŭ kaj kelkaj sekretarioj inkluzive de Sekretario Li enŝutis la preparitajn pomojn kaj pirojn en plastikajn bazarsakojn. Ili dividis inter si la ŝarĝon kaj ekiris por saluti la malsanulojn. Ili unue venis al Ĉen Gingjun, ĉar li loĝas plej proksime.

Jen Ĉen Gingjun malsuprenvenis. Ili lin salutis. Li tre miris, ke venis tiel multaj gvidantoj. Fratino Ĝoŭ diris: “Okaze de la Printempa Festo ni venas por vidi vin. Ĉu vi fartas iom pli bone?” kaj Sekretario Li diris: “Bonan Printempan Feston! Ni venas por saluti vin.” Ĉen Gingjun diris: “Ĉu? Hodiaŭ estas la Printempa Festo? Dankojn al vi, dankojn. Bonan Printempan Feston, bonan sanon!” Sekretario Li diris: “Ĉu estas bone, ke ni iom interparolu en via ĉambro?” “Ne, ne,” rifuzis Ĉen Gingjun, “ĉar vi ne informis min antaŭdate. Vi ne povas eniri.” Iom meditinte, Fratino Ĝoŭ diris: “Do ni ne eniros, kaj Sekretario Li, vi kunportu la fruktojn por li supren. Ni nin turnos al aliaj domoj kaj vi kuratingu nin poste.” Sekretario Li respondis: “Bone.” Fratino Ĝoŭ manpremis kun Ĉen Gingjun kaj deziris al li fruan resaniĝon kaj sin turnis al alia loko. Sekretario Li donis la fruktosakon al Ĉen Gingjun kaj diris: “Pro la Printempa Festo, la organizaĵo donacis la fruktojn al vi. Kaj ni esperas ke vi pli multe kontribuos en la nova jaro al la Partio.” “Mi ne bezonas la fruktojn, ne bezonas,” rifuzis Ĉen Gingjun, “mi fartas bone, nenio ĝenas. . . mia malsaneto, jes. . . dankon al vi, mi tre ĝojas.” Tion dirante li prenis la fruktojn. Sekretario Li aldonis: “Tio estas donacaĵo de la organizaĵo nur por iom esprimi sian prizorgon. Vi devas pli bone zorgi vian sanon por pli bone labori, do vi akceptu ilin.” Li prenis ilin kaj adiaŭis Sekretarion Li ĉe la pordo de la domo. Sekretario Li foriris kaj rapidis al la vico de Fratino Ĝoŭ. Ĉen Gingjun rigardis la forirantan Sekretarion Li kaj rigardis ankaŭ la vicon de Fratino Ĝoŭ ĝis kiam iliaj figuroj malaperis post la butikoj apud la aleo. Abrupte li ege emociiĝis kaj levis la plastikan bazarsakon kaj ĝin detale rigardis dirante: “Jen fruktoj, mi povas manĝi fruktojn kaj tion unuafoje.”

Li flugis al sia ĉambreto kaj tuj sin ŝlisis en ĝi. Li neniam plu elĉambriĝis ĝis kiam forpasis

la ferioj de la Printempa Festo. En la unua tago post la festo Ĉen Gingjun donis stakon da manuskriptaj folioj al Sekretario Li, dirante:

“Jen mia tezo, ĝin mi donas al la Partio.”

Rigardante lin, Sekretario Li demandis mal-laŭte: “Ĉu ĝi estas la (1+2)?”

“Jes, instruisto Min jam tralegis ĝin kaj ĝi estas senerara,” respondis Ĉen Gingjun.

La Matematika Instituto tuj aranĝis malgrandan raportan kunvenon. Dekkelkaj specialistoj aŭskultis la raporton de Ĉen Gingjun kaj unuvoĉe alte taksis ĝin. La Administra Oficejo de la Matematika Instituto sendis lian tezon al la Akademio.

Iutage de aprilo, la Ĉina Akademio de Sciencoj okazigis kunvenon de ĉiuj gvidantoj-partianoj en la Laborista Klubo de Sanlihe. Vicdirektoro K-do Vu Heng faris raporton en la kunveno. Kiam li diris ke iu mezgrada esploranto de la Matematika Instituto akiris gravan frukton de monda nivelo, li ne menciis la nomon de la akirinto. Ankaŭ Sekretario Li ĉeestis la kunvenon, tamen li ne sciis pri kiu oni parolis. La apudsidanto ektuŝis lin. “Kion vi volas?” li demandis. Tiu demandis: “Ĉu vi aŭdis?” “Kion?” Tiu diris: “Tiu estas Ĉen Gingjun!” “Ĉu? Tiel grava frukto?” Tiu respondis: “Jes, tio estas fama problemo de la mondo, vere mirinde!”

En la dua tago, ĵurnalisto de Hinhua-novaj-agentejo venis por intervjuo. Li vidis Ĉen Gingjun, interparolis kun li kaj rigardis lian ĉambron. Li revenis al sia oficejo kaj verkis artikolon kiu tuj aperis en bulteno. La artikolo rakontas pri la travivaĵo de Ĉen Gingjun, lia diligenteco kaj penemo en studado, liaj gravaj fruktoj de scienca esploro kaj lia plua restado en la fumita ĉambreto. Tre malbona estas la vivkondiĉo! Tre serioza estas lia malsano! En danĝerigo estas la vivo!

Prezidanto Maŭ legis tiun raportajn kaj tuj donis instrukcion.

Nokte de tiu tago, k-do Vu Heng eniris en la ĉambron de Ĉen Gingjun.

Li estis tuj sendita al hospitalo kaj lin ekzamenis tutkorpe la estro de la fako por internaj malsanoj de la Ĉefurba Hospitalo kaj la vicministro de la Higiena Ministerio. Li suferis plurajn malsanojn kaj devis tuj enhospitaliĝi por ricevi kuracadon, tamen li ne konsentis. Do oni montris al li la instrukcion de Prezidanto Maŭ.

Li restis en la hospitalo dum unu jaro kaj duono.

Kiam li estis en la hospitalo, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Prezidanto Hua (tiam vicĉefministro) persone aranĝis por Ĉen Gingjun sidlokon de reprezentanto de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso. En la kongreso, Ĉen Gingjun renkontiĝis kun Ĉefministro Ĝoŭ kaj kunsidis kun li en unu grupo. Kaj dum la kongreso kiam li sciis pri la malsano de Ĉefministro Ĝoŭ li ekploris kaj eĉ ne povis endormiĝi kelknokte. Post la kongreso li revenis al la hospitalo.

Kiam li elhospitaliĝis, lia medicina atesto diris:

“Post kuracado en la hospitalo lia ĝenerala stato pliboniĝis. La spirito pliboniĝis kaj la temperaturo estas normala. Lia korpopezo kreskis je kvin kg. lia apetito kaj dormado pliboniĝis. Malaperis abdomenaj doloro kaj ŝveliĝo, en la du pulmoj ne troviĝas aktiva malsana punko. La elektrokardiogramo estas normala, kaj normalas ankaŭ la elektroencefalogramo, la funkcio de liaj hepato kaj renoj, la sanga precipitaĵo kaj sangobildo.”

Pri lia laboro kaj sanstato ankaŭ Prezidanto Hua tre zorgis kaj persone kelkfoje donis instrukciojn.

Jam longe antaŭ la publikigo de lia tezo, la novaĵo estis akirita de okcidentaj ĵurnalistoj, cirkulis tra la terglobo kaj trovis tre fortan eĥon en la mondo. La verko de brita matematikisto Halberstam kaj okcidentgermana matematikisto Richert «Kribra Metodo» estis tiam en presejo, tamen kiam ili legis la tezon de Ĉen Gingjun ili tuj aldonis unu ĉapitron en la libron: La Dekunua Ĉapitro «Pri la Teoremo de Ĉen». Ili laŭdis ĝin kiel “brilan kulminon” de la kribra

metodo. Kaj en matematikaj eldonadoj de fremdaj landoj aperis sennombraj laŭdoj kiel “eminenta sukceso”, “brila teoremo” ktp. Iu brita matematikisto skribis al li: “Vi movis la montaron!”

Vere li havas la spiriton de Malsaĝa Avo kiu translokis montojn.

Oni eble demandas: “Kian utilecon tiu teoremo de Ĉen havas? Kaj en kiuj kampoj ĝi estas uzebla?”

La sciencaj sukcesoj ĝenerale dividiĝas en jenajn du specojn: tiuj, kiuj havas rimarkindajn ekonomiajn valorojn kaj kies prezoj povas esti kalkulitaj per dekmiloj aŭ centmilionoj da

juanoj, estas “valoradoj prezohavaj”; kaj tiuj, kiuj povas ludi tiajn aŭ aliajn rolojn en makrokosmo, mikrokosmo, kosmaj korpoj, elementa partiklo, ekonomia konstruado, nacidefenda scienco, natura scienco kaj filozofio de dialektika materiismo ktp. ktp., kies ekonomia valoro estas netaksebla kaj ne povas esti kalkulita per ciferoj, estas nomataj “valoradoj senprezaj”. Ekzemple, la teoremo de Ĉen estas tia.

Nun restas nur unu paŝo al la brila perlo sur la krono.

Sed tiu estas la plej malfacila paŝo. Rigardu, al kiu fine la perlo apartenos.

(Fino)



La Dek Tri Maŭzoleoj

de JANG HONGHJUN


ĈE la piedo de Tianŝou-monto ĉ. 50 kilometrojn fora nordokcidente de Pekino, sin trovas maŭzoleoj de 13 imperiestroj de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.). Pekino fariĝis ĉefurbo de Ming-dinastio ekde ĝia tria imperiestro, kaj de tiam la mortintaj imperiestroj estas entombigitaj en tiu montregiono. Komence de Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.) Ĉinio kreis arkitekturon de maŭzoleoj laŭ natura oportuna situo de montoj, tiel ke maŭzoleoj montriĝas pli majestaj kaj pompaj.

La 13 maŭzoleoj situas en baseno kun areo de proksimume 40 kvadrataj kilometroj triflanke ĉirkaŭata de montoj escepte de la sudo, kie tro-

viĝas enirejo de la maŭzolea regiono. La plej frue konstruita maŭzoleo Ĉangling troviĝas ĉe la piedo de la ĉefpinto de Tianŝou-monto en la nordo kaj fariĝis centro de la maŭzoleoj sinsekve konstruitaj poste. Ĉangling, maŭzoleo de Ĝu Di (imperiestro Ĉengzu), kiu la unua prenis Pekinon kiel ĉefurbon de Ming-dinastio, estas la plej granda el la 13 maŭzoleoj. Ĝia konstruado heredis kaj disvolvis la tradicion de maŭzolea arkitekturo de la antikva Ĉinio. Ĝi povas esti rigardata kiel ĉefverko de imperiestraj maŭzoleoj en la malfrua periodo de la ĉina feŭda socio kaj manifestis la atingon de la ĉina antikva

arkitekturo en utiligo de natura oportuna situo.


La maŭzoleo Ĉangling konsistas el la ĉefparto kaj maŭzolea vojo. La maŭzolea vojo longas je 7 kilometroj, laŭ ĝi estis starigitaj ŝtona *pajfang*-o (pordforma trapasejo simila al triumfarko), palaca pordego, memorŝtona turo, statuoj kaj aliaj. Kvinporda *pajfang*-o el blanka marmoro sur altaĵo estas sojlo de la maŭzolea regiono. Ascendinte la altaĵon, oni povas vidi la marmoran *pajfang*-o sur la fono de blua ĉielo kaj ŝvebantaj nuboj, kvazaŭ ascendante sur la ĉielon. Trapasinte la *pajfang*-on, oni plu iras antaŭen kaj venis al la pordego de la maŭzolea




Mapo de la Dek Tri Maŭzoleoj

1. Ŝtona Pajfang-o
2. La Ruĝa Pordego
3. Memorŝtona turo
4. Ŝtonaj ceremoniaj gardantoj
5. La maŭzoleo Ĉangling
6. La maŭzoleo Dingling
7. Tianŝou-monto

regiono, konstruaĵo simila al palaca pordego kun karmezina muro, kiu situas inter du kontraŭe starantaj montetoj. Ĝin trairinte, oni sentis ambaŭflankajn montojn similaj al du gvatturoj ĉe la enirejo de antikvaj palacoj aŭ maŭzoleoj. Tiu saĝa dispozicio inkluzivis la du montojn kiel parton de konstruaĵoj. Enirinte la pordegon, oni povas vidi la memorŝtonan turon en la mezo de la maŭzolea vojo, ĉe kies kvar anguloj staras po blankmarmora Huabiaŭ — ornamita marmora kolono. Trapasinte la memorŝtonan turon, oni povas vidi ŝtonajn ĉevalojn, elefantojn, leonojn, kamelojn kaj mitajn bestojn Ĉilin, ankaŭ ŝtonajn statuojn de ministroj kaj generaloj, starantajn ambaŭflanke de la maŭzolea vojo kiel ceremonian gardantaron. Ili ĉiuj staras en serioza pozo por doni al la preterpasantoj solenecon kaj imponecon. Post ili estas ŝtona draka-feniksa pordego. Post ĝi plue etendiĝas longa kaj majesta maŭzolea vojo, ambaŭflanke de kiu ne troviĝas plu konstruaĵo, impone staras nur ser-



Panoramo de la maŭzoleo Dingling



Stona Pajfang-o


pentumaj montoj. La projektintoj metis la vojon pli proksime al la flanko kun pli malaltaj montoj, tiel, ŝajnas al la irantoj sur la vojo, ke ambaŭflankaj montoj kun malsama alteco estus tute simetriaĵoj ĉambroj kaj la baseno de la maŭzolea regiono estus placo antaŭ palaco. Ĉe la fino de la maŭzolea vojo la ĉefparto de Ĉangling elrigardas inter verdaj pinoj kaj cipresoj ĉe la piedo de la monto. Por faciligi vizitadon al la maŭzoleo, oni pavimis aŭtovojon flanke de la maŭzolea vojo.

La vojo kondukas rekte al la maŭzoleo, tamen la veturantoj ne povas spekti la maŭzolean vojon 7 kilometrojn longan. Estas konsilinde, ke oni ne domaĝu sian forton por piediri laŭ la vojo, se oni volas apreci la arkitekturan arton de la tuta maŭzoleo.

La ĉefparto de la maŭzoleo estas grupo da konstruaĵoj konsistanta el haloj, gvatturoj kaj aliaj kun flavaj glazuritaj tegoloj, ĉirkaŭitaj de palaca muro. Ambaŭflanke de la

fronta halo troviĝas akcesoraj haloj, koridoraj ĉambroj, fasta palaco kaj konstruaĵo por kuirado. Post la pereado de Ming-dinastio, la registaro de King-dinastio ilin malkonstruis. Nun sur la centra aksa linio restas palaca pordego, konstruaĵo Leng-en-pordego, Leng-en-halo, kvadrata maŭzolea murego kun etaĝkonstruaĵo sur ĝi. Leng-en-halo konstruita sur trietaĝa blankŝtona teraso, simila al Tajhe-halo en la imperiestra palaco, longas je 29 metroj de sudo ĝis nordo kaj larĝas je 66 metroj de oriento ĝis okcidento. En la halo troviĝas dekoj da dikaj kolonoj altaj je dek metroj el sola trunko de bonkvalita ligno. Tiu ĉi konstruaĵo de ligna strukturo por kulta soleno finkonstruita antaŭ pli ol 550 jaroj estas bone konservata. Post la halo estas kvadrata maŭzolea ĉirkaŭmuro 1 kilometron longa, sur kies fronta pordego troviĝas etaĝkonstruaĵo, kiun oni povas ascendi tra ŝtuparo. Sub la tomo ĉirkaŭata de muro estis metitaj la ĉerkoj de la imperiestro Ĉengzu kaj lia edzino. Subtere estis konstruitaj kelkaj tomboĉambroj similaj al tiuj de la "subtera palaco" de la maŭzoleo Dingling malkovrita en 1956.


La maŭzoleo Dingling, tomo de Ĝu Jiĝun, la 13-a Ming-dinastia imperiestro Ŝenzong kaj liaj du



◁ *Krono el oraj dratoj*

Diafana jada bovlo ▷





Leng-en-halo

edzinoj, estas mezskala kaj situas ĉe montpiedo okcidente de Ĉangling 2.5 kilometrojn fora. Ĝu Jiĝun tenis kronon 48 jarojn (1573-1620 p.K.). En lia aĝo de 22 jaroj kaj en la 12-a jaro post lia surtroniĝo komenciĝis la konstruado de lia maŭzoleo.

Ĝiaj subteraj konstruaĵoj konsistas el la ĉambroj fronta, meza, posta kaj du flankaj dekstre kaj maldekstre kun areo de 1195 kvadrataj metroj. La projekto similas al tiu de la imperiestra palaco. La arkaj ĉambroj estis masonitaj el ŝtono. La tri pordegoj kun klapegoj pezaj po 4 tunoj el sola blankmarmora peco interli-



Valoregaj antikvaĵoj de Ĝongŝan-regno

de JUAN HIAN

EN Pingŝan-gubernio de la okcidenta parto de Hebej-provinco, ĉinaj arkeologoj trovis restaĵojn de la ĉefurbo de Ĝongŝan-regno ekzistinta antaŭ pli ol 2,000 jaroj kaj elterigis pli ol 10,000 valoregajn antikvaĵojn. Ili estas tre valoraj materialoj por esplorado pri la historio de la antikva Ĝongŝan-regno kaj la kulturo de la periodo de Militantaj Regnoj de nia lando.

La nomita regno ekzistis en la Periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). Ĝiaj prapatroj "di-oj" estis nacimalplimulto el la antikva norda Ĉinio. Dum la centoj da jaroj de la Periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj de Militantaj Regnoj (770-221 a.K.), ili kontaktiĝis kun

la popoloj de aliaj naciecoj de centra Ĉinio kaj iom post iom kunfandiĝis kun la aliaj naciecoj. Ili ludis gravan rolon en la interŝanĝo de kulturoj inter la naciecoj de norda kaj centra Ĉinio kaj kreis la brilan kulturon de Ĝongŝan-regno.

La tereno de la ĉefurbo de Ĝongŝan-regno, kiu situas en Sangi-komunumo de Pingŝan-gubernio, longas 4 kilometrojn de sudo al nordo kaj ĝia larĝeco de oriento kaj okcidento estas en esplora fosado. La arkeologoj trovis en la urbo restaĵojn de loĝdomoj kaj metiejoj de fajencaĵoj, ostajoj, bronzaĵoj kaj feraĵoj de la Periodo de Militantaj Regnoj. En la nordokcidenta parto de la urbo estas tri maŭzoleoj de

reĝoj de Ĝongŝan-regno kaj okcidente de la urbo estas kelkaj tombejoj de tiu periodo.

Inter la elterigitaj valoregajoj estas W-formaj bronzaĵoj uzataj en Ĉinio. Probable ili simbolas aŭtoritaton de la plej alta reganto de Ĝongŝan-regno. Valorega estas la elterigita bronza lamparbo kun vivecaj homfiguroj, drakoj kaj simioj.

Alia admirinda trezoraĵo inter la bronzaĵoj de la Periodo de Militantaj Regnoj estas kvadrata bronza soklo el kvar kuŝantaj cervoj subtenantaj rondan platon, sur kiu kvar feniksoj kaj kvar drakoj interplektiĝas. La bela bronzaĵo

gas la ĉambrojn frontan, mezan kaj postan. Sur rektangula ŝtona lito de la posta ĉambro, 30 metrojn longa, 9 metrojn larĝa kaj 9.5 metrojn alta, metiĝis tri ĉerkoj (nun ekspozitaj estas kopioj), la imperiestra en la mezo, la imperiestroedzinaj ĉe ambaŭ flankoj.

En tiu ĉi subtera palaco troviĝas pli ol 2,000 orajoj, arĝentajoj, jadaĵoj, porcelanajoj, lakajoj, silkajoj kaj aliaj, inter kiuj multaj estas kuriozaj, ekzemple, krono lerte interplektita el oraj dratoj, du imperiestredzinaj kronoj inkrustitaj per po pli ol 100 gemoj kaj pli ol 5.000 perloj kun diversaj grandecoj.

Unu peco inter la gemoj kostas 500-600 uncojn da arĝento, per tiu sumo oni povis aĉeti 70 tunojn da rizo tiutempe. Plejparto de tiuj raraj historiaj objektoj estas ekspozitaj en la ekspoziciejo de Dingling-muzeo. La maŭzoleo kaj la kuriozaĵoj trovitaj en la subtera palaco de Dingling ne nur multe helpis nin en studo pri la sepulto de Ming-dinastio, sed ankaŭ montris eminentajn arkitekturon kaj metiarton de la laboranta popolo de Ming-dinastio.

La popolo devis fari grandan elspezon kaj oferon por konstrui tiajn majestajn maŭzoleojn. Nur la

konstruado de Dingling konsumis 800 milionojn da uncoj da arĝento, tio estas kosto de unujara greno bezonata de 10 milionoj da mizeraj kamparanoj tiutempe. La konstruado daŭris 6 jarojn. Ĉiutage dum intensa konstruado laboregis tie pli ol 30,000 soldatoj kaj laboristoj. La ligno, ŝtonoj, brikoj, tegoloj kaj aliaj materialoj por la konstruado estis transportitaj el diversaj lokoj de la lando, kio estis malfacilega tiutempe. Kiom da homoj perdis sian vivon en ekspluatado kaj transportado de tiuj materialoj. Tial, la 13 imperiestraj maŭzoleoj estas ankaŭ atestajoj pri la damninda regado de la ĉina feŭda klaso.

estas inkrustita per oro kaj arĝento kaj sur ĝia soklorando gravuriĝis vortoj.


Bronza lamparbo kun 15 lampoj de alta artnivelo spegulas la saĝecon de la laboranta popolo de la periodo de Militantaj Regnoj. Ĝia formo similas al prospera arbo. La soklo formiĝis el tri kaŭrantaj

tigroj. Sur la soklo estas 15 branĉaj lampoj, sur kiuj estas ludantaj simioj, rampantaj drakoj kaj kantantaj birdoj. La lamparbo konsistas el 8 disigeblaj partoj kaj oni povas malmunti ĝin kaj meti en keston por facila portado.


Inter la elterigitaj bronzaĵoj estas 9 bronzaĵoj (tripieda poto aŭ


incensujo) de diversaj grandecoj, kiuj metiĝis en la tombo laŭvice de la grandeco. El ili la plej granda altas je 50.4 centimetroj kun diametro de 65.8 centimetroj. Sur ĝi estas 469 gravuritaj vortoj. Ĝi estas la dingo kun plej multaj gravuritaj vortoj, krom Maŭgong-dingo, kaj estas valora materialo por historia esploro.

Bronza fajrujo



Fajenca poto kun tigrodesegnoj





W-formaj bronzaĵoj

Inter la elterigitaj bronzaĵoj pli ol 50 bronzaĵoj surhavas gravuritajn vortojn, kiuj plejparte registris la datojn de ilia kreado, la nomojn de la institucio, la administranto kaj la metiistoj, kiuj zorgis pri la farado. Sur 4 bronzaĵoj gravuriĝis relative longa teksto. Krom bronza dingo kun feraj piedoj, ankaŭ kvadrata bronza kruĉo kun desegnoj de drakoj surhavas 450 gravuritajn vortojn. Tiuj gravuritaj vortoj estis majstre kaj elegante faritaj de spertuloj. Ili vere estas eminentaj artaĵoj.

Multaj el la bronzaĵoj estas tre raraj majstraĵoj kaj havas tre altan valoron de arto. Ekz., la bronza soklo de tigo kun cervo en la buŝo inkrustita per oro kaj arĝento havas vivecajn figurojn. La mitaj flugilhavaj bestoj inkrustitaj per arĝento aspektas kvazaŭ en rapida movo. Ili ja estas raraj artaĵoj.

Inter la elterigitaj objektoj, krom la bronzaĵoj troviĝas granda tendoframo kaj leda tendo, vivbezonaĵoj

kiel varmigiloj, kuiriloj, drinkiloj kaj diversaj bele gravuritaj jadaĵoj. En la tombo, krom skeletoj de ŝafoj kaj ĉevaloj, estas ankaŭ tiuj de hundoj. Du hundoj portis kolierojn el oro kaj arĝento. Antikvaj libroj de nia lando notis, ke "hundoj kaj ĉevaloj estas ornamitaj per oraĵoj kaj arĝentaĵoj", sed antaŭe oni neniam trovis konkretan ateston pri tio. Ĉifoje oni trovis tion. Tio montris la luksan vivon de la entombigito antaŭ la morto.

En la historiaj libroj de Ĉinio ne estas klara noto pri la landlimo de Ĝongŝan-regno. La elterigitaj antikvaĵoj kaj la koncernaj historiaj libroj montris, ke Ĝongŝan-regno inkluzivis eble la nunan Baŭding de Hebej-provinco, la sudan parton de Manĉeng kaj la regionon de Ŝigiaĝuang. En la jaro 296 a.K. la regno estis pereigita de la regnoj Ĝaŭ, Ki kaj Jan. En la longa historio de nia lando, same kiel la aliaj frataj naciecoj, ĝi estis parto de Ĉinio kaj faris certan kontribuon en la historio de nia lando.

KALETROSKOPO

Movo de ŝakpecoj

(Ludo)



Supre estas 6 alterne metitaj nigraj kaj blankaj ŝakpecoj. Nun oni deziras, ke la tri blankaj troviĝu maldekstre kaj la tri nigraj dekstre. Por plenumi tion oni povas movi trifoje po du pecojn sen ŝanĝo de ilia origina vico. Ĉu vi interesiĝas pri la ludo? Bonvolu provi.

(Solve en la venonta numero)

Tibeta neĝtetro

La tibeta neĝtetro (*Tetraogallus tibetanus*) estas tipa specio de alt-



ALIA ULTRAPROFUNDA PUTO BORITA DE NIA LANDO

Lastatempe en Siĉuan-provinco de sudokcidenta Ĉinio abunda je petrola kaj natur-gasa riĉfontoj la putobora taĉmento n-ro 7001 sukcese boris 7,175-metran profundan puton post sukcesa boro de 7,058-metra profunda puto en julio de la pasinta jaro. La puto estas la tria ultraprofunda puto de nia lando.

ebenaja birdo. Ĝi vivas ordinare en dezerta altmonta zono je ĉ. 4.000 metroj super la marnivelo kaj ne timas neĝostormon. Ĝi havas pale grizajn plumojn, similajn en koloro al la ĉirkaŭaj rokoj. Kiam ĝi renkontas malamikon, ĝi ofte restas senmova por eviti atakon.

La tibeta neĝtetro havas grasan korpon kaj delikatan bongustan viandon. Tibetanoj asertas ke ĝia viando povas kuraci reŭmatisman kaj pro tio ĝi estas alte taksata.

La Ŝaŭhing-a arako

La Ŝaŭhing-a arako de nia lando havas historion de pli 2.300 jaroj. Ĝi estas milda alkoholaĵo farita el bona glueca rizo, bonkvalita tritiko kaj Gianhu-laga akvo per speciala procedo. Ĉar ĝi produktiĝas en

Ŝaŭhing-gubernio de Ĝegiang, oni nomas ĝin Ŝaŭhing-a arako.

La Ŝaŭhing-a arako havas hele oranĝan koloron, dolĉetan guston kaj intensan aromon. Ĝi estas tenata ordinare en fajenca barelo hermetike fermita kaj konservata en kelo. Kiam oni malfermis la vazon post longa konservado, la bonodoro de la likvoro tuj plenigas la tutan ĉambron.

La Ŝaŭhing-a arako entenas vitaminon, proteinion, hidrokarbidon, nitrogenon kaj multajn minaĵojn. Ĝi estas ne nur bona kondimento kaj superaĵo por tizano sed ankaŭ bona trinkaĵo, kaj trinko de modera kvanto da ĝi povas akceli sangan cirkuladon, vigligi spiriton, forigi lacon, helpi digestadon, doni apetiton, varmigi korpon, moderigi soifon kaj fortigi sanon.



La puto situas en transira zono de du malsamaj geologiaj epokoj kaj estas regiona prospektora puto. Dum la putoborado estas akiritaj pli ol 334.000 geologiaj donitaĵoj, kiuj liveris gravan bazon por pluapase ekspluati gason kaj petrolon de Siĉuan-provinco.

PLIMULTIĜO DE SPECOJ DE ĈINAJ SILKAĴOJ

De la lastaj jaroj plimultiĝas specoj de silkajoj. Krom produkti silkajojn kun desegnoj de ĉina stilo, novaj floraj kaj geometriaj desegnoj, nia lando ankaŭ faras projekton laŭ modaj desegnoj de la internacia merkato kaj specimenoj de la mendantoj. En la pasinta jaro, sole en Ŝanhajo oni projektis pli ol 1.000 specojn de novaj desegnoj por la internacia merkato. Nun la silkajoj de nia lando estas eksportitaj al pli ol 80 landoj kaj regionoj. En la unua duono de la kuranta jaro, la

produktokvanto de silkajoj de nia lando kreskis je 19.8% kompare kun la sama periodo de la pasinta jaro.

GRANDA AREO DA SOVAĜA MIGDALARBARO TROVITA EN HINGIANG

Lastatempe sciencaj laborantoj de nia lando trovis grandan areon da densa sovaĝa migdalarbaro en Taĉeng-regiono de Hingiang. Laŭ unuapasa enketado, la migdalarbaro kovras areon de ĉirkaŭ 70.000 muoj (15 muoj = 1 hektaro).

Tre nutra kaj aroma amando estas unu el la plej bongustaj nuksoj en la mondo. Troviĝas ankaŭ nemanĝebla amara amando, kiu povas esti uzata kiel substanco de medikamentoj por kuraci iujn malsanojn.

La sovaĝa migdalarbaro nove trovita en Hingiang estas malalta kaj ties amando estas amara, adstringa kaj nemanĝebla, tamen la eltrovo


liveris valorajn materialojn kaj riĉfonton por nia lando en esplorado kaj kulturado de migdalarbo.

NOMBRO DA NATURSCIENCAJ ASOCIOJ DE PEKINO RESTARIGITA

Lastatempe la antaŭaj 43 fakaj asocioj de naturaj sciencoj de Pekino, kiaj tiuj de konstrua inĝenierado, aviado, elektroniko, forstumo, medicino, mekaniko kaj psikologio, ĉiuj restarigis sian aktivadon. Nombro da novaj fakaj asocioj estas en establado.

Ilia tasko estas disvolvi sciencon interŝanĝon, altigi la nivelon de fakuloj kaj popularigi sciencajn kaj teknikajn sciojn inter la amasoj.

De la lasta duonjaro la partoprenantoj de scienca aktivado de tiuj ĉi asocioj jam atingis 160.000 personfojojn.



KOLORA FAJENCA VAZO DE PRIMITIVA SOCIO TROVITA EN KINGHAJ

Kolora fajenca vazo estis trovita en tombejo de neolitiko en la Supra Sungiaĝaj de Kinghaj-provinco. La internon de la vazo kovras pentraĵo de 15 man-en-mane dancantaj homoj en tri grupoj. Specialistoj konstatis, ke la trovo de tiu ĉi valora historia objekto liveris materialojn por esplori la kulturen vivon de la primitiva socio antaŭ 5,000 jaroj.

La vazo estas alta je 14 centimetroj kun la buŝa, ventra kaj funda diametroj respektive de 29, 28 kaj 10 centimetroj. La dancantaj hom-figuroj ĉe la supra interna faco formis rondon laŭ la vazorando. La ekstera malsupra brako de la dancantoj estis pentrita per du strioj, kio montras viglan moviĝadon de la brakoj. La haroj de la dancantoj estis pentritaj en direkto kontraŭa al iliaj garnaĵoj, kio montras, ke oni dancas. Sub la dancantoj estas kvar paralelaj strioj kiuj simbolas probable tersurfacon kaj lageton. La tuta pentraĵo prezentas, ke antikvuloj plenverve kantas kaj dancas ĉe la lageto post laborado.

KONSTRUADO DE MEMORHALO DE LI BAJ EN SIĈUAN

La konstruado de la memorhalo de Li Baj, granda poeto de Tangdinastio de Ĉinio (618-907 p. K.) estas intense iranta en Giangjoŭ-gubernio de Siĉuan-provinco kaj malfermiĝos al la publiko en la unua de oktobro, 1979, la 30-a datreveno de la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Li Baj naskiĝis en la jaro 701 ĉe Sujje-rivero sude de Balkaŝo en la Meza Azio. En la jaro 705, lia patro transloĝiĝis, portante la kvin-jaran Li Baj, al Kinglian-vilaĝo de


Giangjoŭ-gubernio, Siĉuan-provinco kaj en la aĝo de dek ok jaroj li vojaĝis al Ĉengdu.

Samtempe kun la konstruado de la memorhalo de Li Baj, la prepara oficejo de la memorhalo ankaŭ kolektas grandan kvanton de liaj verkoj de diversaj eldonoj, pentraĵoj pri liaj poemoj kaj aliaj koncernaj materialoj. Ankaŭ la loĝejo de Li Baj, lia studteraso kaj aliaj restaĵoj en Kinglian-vilaĝo estas riparitaj.

BLANKA ANSERO DE TAJHU-LAGO EN TIBETO

Agronomiaj laborantoj de Lasao arte elkovis blankajn anseridojn post venko de malfavoraj kondiĉoj de manko de oksigeno kaj malalta atmosfero en la altebenajo. La nomitaj anseroj, kiuj origine vivas en Tajhu-lago ĉe la buŝo de Jangzrivero, vivas jam du jarojn en la monda firsto Tibeto. Ili kreskas bone kaj anserinoj metas ovojn normale.

La sukcesa eksperimentado kreis favorajn kondiĉojn por bredi grandkvante naĝbirdojn sur riveraj bordoj kaj en marĉaj lokoj de la Tibeta Altebenajo riĉaj je akvo kaj herboj.



Ĉengdu

Kiel ĉefurbo de Siĉuan-provinco, Ĉengdu estas politika, ekonomia kaj kultura centro de la provinco. Ĝi situas sur la okcidenta ebenaĵo de tiu provinco. Ĝi enhavas 5 distriktojn kaj du guberniojn kun totala areo de 3,861 kvadrataj kilometroj kaj pli ol 3,700,000 loĝantoj.

Ĝia klimato estas milda: La tutjara mez-nombra temperaturo estas ĉ. 17°C, ĝia somero estas ne tro varma, malofte neĝas en vintro, ĝia precipitaĵo estas ĉ. 1,000 milimetroj en ĉiu jaro kaj la prujno-periodo estas nur pli ol 2 monatoj.

Ĉengdu estas urbo kun historio de pli ol 2,000 jaroj kaj ĉ. 400 jaroj a. K. iu feŭda dinastio jam starigis tie sian ĉefurbon. En la periodo de la Tri Regnoj je pli ol 200 jaroj p. K., energie oni disvolvis la bredadon de silkraŭpoj kaj sekve tre prosperis tie la produktado de silkajoj. En antikveco, multaj famaj literatoroj, kiel ekzemple Du Fu kaj Lu Joŭ, longe loĝadis en Ĉengdu kaj verkis tie senmortajn poeziaĵojn.

Sed dum la regado de Kuomintango antaŭ la Liberigo, la industria produktado de Ĉengdu estis tre postiginta. Tiam ekzistis tie nur dekelkaj malgrandaj fabrikoj kaj metiejoj kaj ĝi vere estis urbo de konsumantoj.

Post la Liberigo, Ĉengdu fariĝis nova socialisma industria urbo dank' al la konstruado en la pasintaj pli ol 20 jaroj. Ĝi havas nun la industriajn branĉojn de fero, ŝtalo, precizaj maŝinoj, elektroniko kaj kemio, kaj estas ankaŭ grava trafika centro en sudokcidenta Ĉinio.


Ankaŭ la aferoj de kulturo, edukado kaj higieno multe progresis. Nun en la urbo troviĝas 12 altaj lernejoj, 17 mezgradaj fakaj lernejoj, 320 mezlernejoj kaj pli ol 1,800 elementaj lernejoj. Tie funkcias pli ol 600 kuracejoj kaj sanprotektaj instalaĵoj, pli ol 100 kinejoj kaj fabrikaj kluboj, krom teatraj trupoj kaj stadionoj.

Multe plivastiĝis la areo de la urbo kaj tute ŝanĝiĝis la fizionomio de la malnova Ĉengdu kun kadukaj malnovaj domoj, kaj nun la urbo ekplaĉas per siaj novaj konstruaĵoj.





La Suda Popola Vojo



La Parko de Vanggiang-turo



Strata parko nove starigita apud Gingiang-rivero




Vanggiang-turo


Valoregaj
Antikvaĵoj de
Ĝongŝan-regno



Bronzaj lampoj kun homfiguro arĝentkapa




Bronza lamparbo




Bronza ding-o kun feraj piedoj


Soklo kun cervoj kaj interplektitaj drakoj kaj feniksoj




Bronza soklo de tigo kun cervo en la buŝo inkrustita per oro kaj arĝento




Kvadrata bronza kruĉo



Ronda fajenca kruĉo






Mitaj flugilhavaj bestoj inkrustitaj per arĝento

DINGDING KAJ AVIADILETO

Teksto de Ĝang Ŝuli
Bildoj de Ĉen Jadan



1. Dingding pensas absorbite: "Mi fariĝos piloto kiam mi plenkreskiĝos."



2. Ĉiuj lernantoj atente aŭskultas la instruistinon, sed nur Dingding ludas aviadileton.



3. Nokte li sonĝas, ke lia aviadileto flugas en la aero.



4. Ĝoje li palpas la mezurajn aparatojn, sed ne scias kion fari pri ili, kaj li ekkrias pro maltrankvilo. Tiam li vekiga el la sonĝo.



5. Dingding komprenas, ke li devas diligente lerni por fariĝi piloto en la estonto.

8157

